



POR/PER ESPERANTO “Esence ĉio devas ŝanĝiĝi por ke la kerno ‘disvastigo de Esperanto’ ne ŝanĝiĝu.” Per tiu frazo Renato Corsetti finas sian artikolon *Floru 200 floroj* en la rubriko *Por/Per Esperanto*. Paĝo 10

Per la respektinda opinio de Hans Bakker revenas sur la scenejon la E-konflikto en Afriko



OPINIOJ KAJ ARGUMENTOJ Heroldo de Esperanto havas kiel devizon “Ni pripensas la mondon”. Tio inkluzivas pripensadon de Esperantujo kaj ni ĉiuj devas tion fari ne kiel anoj de iu kontinento aŭ lando, sed kiel esperantistoj. Ĉar la konflikto ne venis al la fino, HdE reprenas la temon sur novaj bazoj, kun opinio kaj argumentoj de ambaŭ flankoj. Ne kun la celo, ke iu venku, sed ke avantaĝa interkonsento inter ĉiuj protagonistoj venku **Paĝo 11**

APLIKADO DE ESPERANTO

En la rubriko Internacia Laborlingvo aperas ĉi-numere la unuaj proponoj el serio de ideoj por monda strategio pri la disvolvado de la apliko de Esperanto sur la kampo de la tria sektoro (neprofitaj celoj). Homoj kiuj simpatias Esperanton kaj ĝin lernas estas sufiĉe multaj, sed ni bezonas mondan reton de homoj kiuj estu pretaj doni al Esperanto rolon en la transformado de la mondo. **Paĝo 3**

SCIENCA HEROLDO

Nia rubriko pri scienco fariĝis malferma al kontribuoj de diversaj aŭtoroj. Amri Wandel kaj Roberto Pigro donas siajn kontribuojn. La rubriko povos okupi tutan paĝon estonte, se ne mankos konstantaj kunlaborantoj. **Paĝo 10**

NE FACILAS VENKI DISKUTON

“*Ne facilas venki diskuton. Ĉefe en ekscita kunteksto, en kiu la opinioj reciproke oponiĝas, falsaj novaĵoj proliferas, diskutantoj uzas ofendojn kaj sarkasmon – kaj jarfinaj festoj kreas disputeman medion.*” **Paĝo 2**



Nia kajero pri arto kaj kulturo ĉi-numere okupas pli ol unu paĝon. Eseto pri la 100-jariĝo de Pirandello, verkita de Carlo Minnaja, tri originalaj poemoj (respektive de Jorge Camacho, Paulo Silas kaj Tatyana Auderskaya) kaj artikolo tradukita el la portugala pri la kenjano Ngūgĩ Wa Thiong'o enkondukanta nin en la afrikan literaturon konsistigas la enhavon de Spegulo, kiu povos fariĝi 4-paĝa kajero se ne mankos kunlaborantoj (ankaŭ tradukantoj bonvenas). **Paĝoj 6, 7 kaj 8**

Lingvio

La mondo de la lingvoj

La rubriko Lingvio aperos ekde la venonta numero en tuta paĝo, kiel en la unua numero de la jarkolekto 2017. Mankas kunlaborantoj kiuj verku pri diversaj temoj ligitaj al “lingvoj”: historio de lingvoj, lingvaj rajtoj, esperantologio, lingvo-instruado tra la mondo, Esperanto-instruado ktp. Bonvolu kontakti la redakcion: redakcio@heroldodeesperanto.com. Ĉi-numere estas nur mallonga sed tre interesa teksto pri la literatura babelo. **Paĝo 10**

INTERVJUO

Michael Boris Mandirola, unu el la plej aktivaj esperantistoj el la nova generacio de E-gvidantoj, parolas pri sia laboro kadre de TEJO.

Paĝoj 4 kaj 5



MORESNET

“Ni ne scias, kiel evoluus Esperanto kaj E-movado se la ideo de Amikejo ne fiaskus, sed finfine ĝi fariĝis parto de la Esperanto-historio. Oni povas nun malmulton retrovi de la preskaŭ jarcenta historio de Moresnet. Restis nur 50 limŝtonoj. Kaj kio por ĉiam restos de Amikejo estas la rememoro, almenaŭ se ni daŭre refreŝigos ĝin.” Jolanta van Holstein en La forgesita lando Moresnet. **Paĝo 9**

Memdetermino de la popoloj aplikeblas ankaŭ en Esperantujo



Fabrício Valle

Eldonisto, redaktoro kaj E-entreprenisto



Nu, kial degeneris la rilatoj inter Gbeglo Koffi kaj UEA

Antaŭ nemulte da jaroj, estis preskaŭ neniuj esperantistoj en Afriko. Hans Bakker komencis fari paŝojn por ŝanĝi tion kaj poste fariĝis la ĉefmotoro de UEA por afrika agado. UEA do grave rolis en la disvastigo de Esperanto en la nigra kontinento, sed nun ĝi estas protagonisto en konfliktoj kun parto de la afrika esperantistaro, nome la grupo ĉirkaŭ Gbeglo Koffi.

Tiu kompetenta kaj tre aktiva afrika esperantisto ĉiam havis tre bonajn rilatojn kun Hans Bakker, kaj el tio naskiĝis Instituto Zamenhof (IZo), eble la plej granda atingo de la E-movado en la tuta mondo. IZo gravas tiel kiel ĉiuj rezolucioj de Unesko por Esperanto, sed mankas al ĝi adekvata diskonigo.

Nu, kial degeneris la rilatoj inter Gbeglo Koffi kaj UEA? Mi evitos pritrakti la kaŭzojn de tiu konflikto ĉi-artikole. Nun mi volas nur esprimi mian opinion pri tio, kion mi nomas “mispaŝo de UEA en Afriko”, kiu parte rolas en la plua degenero.

Grava premiso: UEA, nia plej granda internacia E-asocio, povas, rajtas kaj devas agadi en Afriko kaj meritas nian subtenon. Fina punkto. Sed sub kiuj gvidlinioj kaj principoj ĝi agadu, ne nur en Afriko, sed ankaŭ en Azio, Amerikoj ktp? Ĉu UEA pretus agadi en Azio aŭ en Sud-Ameriko kiel en Afriko, alivorte ĉu ĝi estus ĉiam preta diri “kiuj esperantistoj estas fidindaj, bonaj, apogindaj kaj kiuj ne”? La unua granda mispaŝo de UEA estas trakti apenaŭ naskiĝintan afrikan organizaĵon, nome UETA-n, kiel aferon de nur Gbeglo Koffi, homo taksata de UEA kiel malamiko. La opinio de Hans Bakker pri li konigas al ni respektindan homon: “Gbeglo Koffi estas nur aktivulo kiu dediĉis sian laboron, sian malmultan monon, sian tutan vivon ekde 1982 al Esperanto.”

Fakto estas, ke li grave rolas, ke li estas tre kompetenta esperantisto, tre aktiva, inteligenta kaj vigla edukisto. Ĉu la fakto, ke li ne konsentis pri decidoj de UEA antaŭ multe da jaroj estas justa motivo por saboti lian laboron? Ĉu la okazaĵoj de la periodo tuj post la morto de Hans

Bakker estis submetitaj al sendependa taksado? Kio pri la argumentoj de Gbeglo Koffi? Kio pri la tiamaj decidoj de Osma Buller, kiu rolis kerne en la estigo de tiuj konfliktoj inter UEA kaj Gbeglo Koffi? Ĉu estas iu verdikto de sendependa komisiono? Ne, ne estas. Estas nur la argumentoj de unu forta kaj tradicia flanko kaj tiuj de la alia, ne tiel forta. Mi ne pretas verdikti, ke la argumentoj de unu aŭ de la alia flanko estas (mal)pravaj, (mal)veraj aŭ (mal)viglaĵoj, tamen, trans la personaj aliroj, opinioj kaj idiosinkrazioj, mi starigas demandon: **kiu estas la rolo de internaciaj neregistaraj organizaĵoj (ne nur Esperantaj!) kiel UEA (kaj TEJO) en la mondo (ne nur en Afriko) kaj kiel ili devas kondukti?**

Se paroli pri “kiel kondukti NRO-oj”, ĉi-numere la eksprezidanto de TEJO kontraŭdiris sin mem (p. 4 kaj 5): de unu flanko li asertas, responde al iu mia demando, ke “Same estus erare kaj malrespekte difini Afrikon kiel scenejon por eŭropaj organizaĵoj”; de alia flanko li, aludante UETA-n, diras ke “Povas esti ke ĝi faras multon kaj mi tion ne scias, sed la ĉefa agado pri kiu mi scias estas Afrika Kongreso intence organizita por ‘ŝteli’ la nomon al iniciato de UEA.”

Unue, kial UEA bezonas havi sian (!) kongreson en Afriko? Ĉu tio ne estas iniciato por krei malnecesajn scenejon por UEA en Afriko? Alivorte, ĉu UEA bezonas regi kiel mastrumanto de afrika kongreso por atingi siajn celojn en Afriko?

Due, leginte pri la historio de la Afrika Kongreso, laŭ la rakonto de la gbegla flanko, mi emus konsideri, ke “ŝtelo” okazas fare de UEA, ne de UETA. Ĉu la opinio de Koffi valoras neniom? Se ne, el kiu vidpunkto?

Trie, argumentoj kiel “UETA ne havas retejon”, “UETA ne havas multe de membroj”, “UETA estas asocio malstabla kaj finance tre malvigla” ne povas fariĝi platformo por izoli kaj bojkoti ĝin; tute kontraŭe, ili konsistigas kialaron por ke ni sufiĉe vaste kaj firme apogu la evoluon de UETA. La decido izoli UETA-n kaj komenci agi nome de ĉiuj afrikanoj, surbaze de konfliktoj de

opinio kun unu el la korifeoj de la sendependa afrika E-movado, estas inteligenta konduto nek fare de UEA, nek fare de TEJO. Sed, kiel mi diris en la komenco de tiu ĉi artikolo, kaj UEA kaj TEJO povas, rajtas kaj devas agadi en Afriko, kiel internaciaj neregistaraj organizaĵoj, tamen la maniero fari tion devas esti tre bone pripensita. Tiuj kiuj konas la historion de Afriko scias, kion faris tie la grandaj eŭropaj potencoj dum la periodo de la eŭropa koloniado en la nigra kontinento. Mi ne intencas diri, ke UEA agas kiel kolonia organizaĵo - tute ne! - sed bonvolu kompreni, ke esperantistoj ne estas abstraktaj homoj: ili estas ligitaj al la historiaj kaj politikaj aspektoj de siaj lando kaj kontinento. Krome, Esperanto ne estas lingvo neligita al la konkreta historio de la mondo kaj, kiel novtipa lingvo, neŭtrala kaj kun interna ideo, ĝi povas fariĝi ilo por konstruo de nova historio, surbaze de novaj agadpremisoj. Fakto estas, ke Esperanto estas ne nur neŭtrala lingvo por faciligi komunikadon por kulturaj celoj kaj internacia amikeco, sed lingvo ankaŭ por batali kontraŭ maljusteco, malsato, militoj, senlaboreco, koruptado de politikistoj kaj konstrui reciprokajn fidon inter la popoloj de la mondo. Per Esperanto ni laboru por pli bona kaj justa mondo, konsiderante la respekton ne nur al la lingvaj rajtoj sed ankaŭ al la diverseco de opinioj kaj memdetermino de la popoloj. Jes, UEA kaj TEJO devos lerni kio estas memdetermino de la popoloj kaj adapti sian agadon al tiu grava koncepto de la internacia juro (https://eo.wikipedia.org/wiki/Rajto_de_memdetermino), kiu aplikiĝas - adaptite al niaj cirkonstancoj - ankaŭ en Esperantujo. Ĉu UEA pretus agadi en aliaj kontinentoj aŭ landoj kiel ĝi agadas en Afriko?!

Ĉi tiu temo estu deirpunkto por funda reformulado kaj de Esperantujo kaj de la E-movado en la mondo, ĉar ankaŭ ili travivas sian krizon en transira periodo de la historio de la homaro. Ni kaptu la momenton por paŝi antaŭen kiel modelo por la mondo, demonstrante kiom utila povas esti la engaĝo de internacia neŭtrala lingvo en la konstruado de porpacaj pontoj inter la nacioj.

INTERNACIA LABORLINGVO La praktika aplikado de Esperanto tra la mondo

Strategio por evoluigi la aplikadon de Esperanto

La E-movado naskiĝis por vivantigi Esperanton kaj plene atingis sian celon. Nun ni bezonas strategion por fonde disvolvi la aplikadon de Esperanto, sur tute novaj bazoj, per malfermita, horizontala kaj rol-distribua reto de homoj, NROj kaj entreprenoj adoptantaj Esperanton kiel laborlingvon. Heroldo de Esperanto konstante instigas la esperantistojn al la formado de tia reto, nomata Reto Nova, kiu konsistas el nur du tipoj de internaciaj neregistaraj organizaĵoj, nome ĉefmotoraj kaj lokmotoraj, kiuj agados sur la kampo de specifaj fakaj E-movadidoj dediĉitaj al tre specifaj celoj, laŭ la retonova principo de rol-distribuo, interalie la jenaj:

NOVBABELISMO

Celo: agado por aplikado de Esperanto en lingvo-instruado, kiel propedeŭtika lingvo.

Agantoj: profesiaj lingvo-instruistoj, lingvo-lernejoj, neregistaraj organizaĵoj.

Principoj:

- unue instrui Esperanton kaj poste naciajn lingvojn, kun superregado de neniuj naciaj lingvoj;
- la instruistoj de naciaj lingvoj estu ankaŭ instruistoj de Esperanto;
- la instruistoj de naciaj lingvoj estu ĉiam denaskaj parolantoj de la koncerna nacia lingvo instruata de ili;
- profesia laboro kaj pagaj kursoj estos la spino de la novbabelismaj iniciatoj.

Rezultoj: Esperanto iom post iom fariĝos bazo de novtipa industrio de lingvo-instruado, kun multe da salajrataj profesiaj lingvo-instruistoj.

ESPERANTO-LANDOLOGIO

Celo: Agado por disvolvi iniciatojn por produktado de materialo pri landoj (ekonomio, kulturo, historio ktp) en Esperanto kaj krome organizado de kursoj/seminarioj pri ĉiuj landoj de la mondo.

Agantoj: Institutoj, landaj asocioj agantaj kiel pensorganizaĵoj pri siaj landoj, eldonejoj, gazetoj, universitatoj;

Principoj:

- Esperantistoj el ĉiu lando devas intense labori por disvolvi sian E-landologion. Ekzemple: brazilologio, rusiologio, usonologio, togolandologio, ĉiniologio ktp;
- la nunaj landaj asocioj de UEA pripensu la eblon fariĝi ĉefmotoraj asocioj pri sia E-landologio;
- oni serĉu financajn rimedojn flanke de naciaj sponsoroj (fondusoj, universitatoj ktp).

Rezultoj: Esperanto iom post iom fariĝos lingvo taŭga por fakuloj pri la plej diversaj landoj. Ekzemple, se iu fakulo pri historio, internaciaj rilatoj aŭ ekonomio deziras fariĝi brazilologo, li povos trovi en Esperanto sufiĉan materialon, librojn, kursojn kaj eventojn pri la plej diversaj aspektoj de Brazilo.

EKONOMIA ESPERANTISMO

Celo: disvolvi la esperantistan ekonomion.

Agantoj: entreprenoj (profitaj celoj), NROj (neprofitaj celoj) kaj unuopuloj;

Principoj: ekonomia esperantismo povas porti al la mondo specialajn tezojn, kiel ekzemple kunlabori en la starigo de novtipa monda ekonomio, sed tion ni lasu al la teoriistoj. Gravus, ke en Esperantujo disvolviĝu granda komunumo de E-entreprenistoj agantaj en la kampo de eldonado, turismo, lingvo-instruado, internacia komerco ktp.

Rezultoj: la vasta ekspansio de la esperantista ekonomio havos la povon ŝanĝi la percepton de la gazetaro rilate la utilon de Esperanto.

SOCIALA ESPERANTO-ENTREPRENISMO

Celo: fondado kaj disvolvado de plene funkciaj NROj, en ĉiuj kampoj de la tria sektoro, nome en la kampo de ne-registaraj organizaĵoj.

Agantoj: NROj (ĉefmotoraj kaj lokmotoraj asocioj). SEE havos senfinajn branĉojn. En Brazilo oni laboras por la fondo de nova NRO – Sociala Lingvo – ligita al Sociala E-entreprenismo;

Principoj: la principoj universale akceptitaj por la agado de NROj. Tamen, jen aldona principo: anstataŭ klopodi konvinki la

mondon lerni Esperanton, ni uzu Esperanton kiel lingvon de internacia agado por transformi la mondon.

Rezultoj: Nuntempe la esperantistoj klopodas konvinki la internaciajn neregistarajn organizaĵojn adopti Esperanton kiel laborlingvon; per niaj propraj internaciaj NROj, ili vidos en la praktiko kiom utila povas esti Esperanto por la tria sektoro.

LINGVO-MOVADISMO

Celo: agado bazita sur aliro al la kampo de lingvoj: lingvaj rajtoj, esperantologio, interlingvistiko, lingva demokratio ktp.

Agantoj: Institutoj, landaj asocioj, eldonejoj, gazetoj, universitatoj kaj ĉefe la nunaj E-asocioj kun nova strukturo, laborprincipoj kaj celoj.

Principoj: la samaj principoj de la Sociala Esperanto-Entreprenismo, sed tre specifaj kampoj de la lingvo-politiko.

Rezultoj: Kiam ni havos nian Greenpeace por defendo de la minacataj lingvoj, kiam ni havos fortan internacian asocion fokusitan nur en la defendo de la lingvaj rajtoj de la popoloj, kun bombastaj iniciatoj kiom Greenpeace sur la kampo de mediprotektado, ni havos grandan forton.

Se interesas vin la strategio proponita de Heroldo, fariĝu kunfondanto de Sociala Lingvo. Informiĝu ĉe http://bit.ly/SocialaLingvo_noto.

INTERVJUO

MICHAEL BORIS MANDIROLA

“La agado de UEA kaj TEJO disvolviĝu laŭeble ĉie”

Mandirola, 29-jaraĝa, estas magistro pri informadika inĝenierio kaj laboras kiel komputil-konsilisto en firmao la itala urbo Torino. Li eklernis Esperanton per reta kurso de Itala E-Junularo (IEJ) en 2005 kaj aktiviĝis en 2006, kiam li partoprenis la unuan fojon en IJF kaj estis elektita estrarano. Ĝis la fino de lia mandato kiel TEJO-prezidanto li estis en la IEJ-estraro kaj okupis jam ĉiujn eblajn postenojn.

Li ekrilatis al TEJO en 2006 partoprenante en seminario pri lingvaj rajtoj. Poste li iĝis komitatano A (2007), komitatano B (2010) kaj samjare oni elektis lin komisiito pri eksteraj rilatoj (kie li aparte aktivis rilate al Forumo Junulara Eŭropa). En 2011 li fariĝis vicprezidanto de TEJO kaj respondecis dum du jaroj

pri eksteraj rilatoj kaj dum kroma jarduo pri landa agado. En 2015 li estis elektita prezidanto. Krome li estas estrarano de aliaj E-organizaĵoj, kiel NITOBĖ, radikala asocio por lingvaj justeco kaj demokratio.

Li deklaris – laŭ artikolo pri li en TEJO-retejo kaj aliloke, en publikaj deklaroj kaj artikoloj – ke eksteraj rilatoj estas por li prioritato. Li kredas ke porti nian idearon pri lingva justeco al junularpolitikaj tavoloj kaj kreskigi la respekton kaj la subtenon al Esperanto kiel solvo al la problemoj de internacia komunikado estas unu el la plej gravaj taskoj de TEJO. Li celis, en sia mandato kiel TEJO-prezidanto, plifortigon de TEJO jure, finance kaj homforte, sed li konfesas, ke li ne atingis la financajn celojn.*

Fabricio Valle

redakciadirektoro@heroldodeesperanto.com

Vi ĵus finis vian trian mandaton kiel TEJO-estrarano, dum kiu ĝi sukcesis fari tre radikalan paŝon, nome sendependiĝon de UEA. Kio rolis esence en tiu strebado fari el TEJO sendependan organizaĵon?

Eksteraj rilatoj kaj subvencioj estis la plej gravaj kialoj por la jura memstariĝo. Niaj antaŭaj ambiguaŭ rilatoj kun UEA jam kaŭzis plurfoje problemojn rilate subvenciojn, plejlaste la maleblon peti administran subvencion en 2012 sed ankaŭ multe pli frue redonon de granda subvencio en la epoko de Ilja De Coster kiel kasisto.

Koncerne al eksteraj rilatoj, TEJO agadas en diversaj internaciaj kadroj, kie la kondiĉoj postulas ke organizo estu registrita (kia TEJO estas ekde 2007, kvankam tio teorie ne eblis laŭ la eksa Statuto de UEA), gvidata de gejunuloj kaj ke ĝi ne estu submetata al eksteraj gvidantoj. Ni sukcesis ĝustatempe, ĉar en aŭgusto 2017 Forumo Junulara Eŭropa petis de ĉiuj siaj membraj organizoj komuniki sian juran statuton al ĝi kaj ni povis senkaŝe informi ke ni estas vereniging met volledige rechtsbevoegdheid.

Sed la fakto ke TEJO nun estas plene memstara organizaĵo estas granda defio kaj problemoj kun UEA, kiel la konfliktoj kun ĝia Ĝenerala Direktorio (ĜD), Veronika Póor, montras ankorau ne tute glatan vojon. Veronika estas juna homo kaj ni ne povas paroli pri generacia konflikto. Kio vere kreis tiom da obstakloj inter TEJO kaj UEA?

La defioj kaj la problemoj kun UEA ne dependas de nia jura memstareco. Eĉ male, ili estus multe pli akraj kaj damaĝaj se TEJO ne

estus jure memstara kaj pli strikte dependus de Veronika Póor.

La esenca problemo estas, ke ŝi emas ĉion kontroli, ŝi antaŭvidis kernan rolon en TEJO kaj eksplicite esprimis sian vidpunkton ke ĜD estas supera al estrarano.

La Estraro de TEJO havas alian ideon, tamen ni volis eviti konfliktojn dum la procezo por nia jura memstariĝo kaj, pro tio ke Veronika estas homo kun firmaj pozicioj kun kiu apenaŭ eblas rekte negoci, ni simple ne alfrontis la temon pri la rolo de la ĜD, limigante nin al fojfojaj malkonsentoj pri specifaj aferoj.

Tiuj malkonsentoj tamen iom post iom akumuliĝis ĝis septembro, kiam venis forta peto (de ŝi kaj de la prezidanto de UEA) klarigi la rolon de la ĜD en TEJO. Tiam ni engaĝiĝis preparante ampleksan dokumenton pri la rolo kaj la respondecoj kiujn ni antaŭvidis, tamen Veronika Póor ne akceptis trakti tiun “agreŝman” dokumenton kaj tiel evidentiĝis ke la pozicioj inter TEJO kaj UEA pri ŝia rolo en TEJO estis neniel akordigeblaj.

La postaj monatoj estis sinsekvo da ĉikanetoj de Veronika Póor kontraŭ TEJO per pretekstaj prokrastoj aŭ nepetitaj intervenoj. Aliflanke estis streboj de UEA kaj TEJO trovi interkonsentojn kiuj konkretiĝis en dokumentaj malnetoj pri kiuj ne eblis alveni al komune akceptebla versio.

La “politikaj” diferencoj inter UEA kaj TEJO estas neglekteblaj – la tuta problemo estas ĉirkaŭ la ĜD kaj la malsama rolo kiun ĝi kaj TEJO antaŭvidas por tiu posteno.

Via informo, ke Veronika Póor eksplicite esprimis sian vidpunkton, ke ĜD estas supera al estrarano, levas la diskuton pri la strukturo de UEA kaj la rolo de ĝia ĜD al la plej alta nivelo. La estraranoj estas volontuloj disaj tra la



Klare en la nuna reta epoko ne plu nepras asocio por konekti esperantistojn, malkiel en la epoko kiam naskiĝis UEA

mondo. Ili ne havas la eblon zorgi la tutan tempon pri la UEA-aferoj. La ĜD estas dungita oficisto kaj fakto estas, ke tiu rolas kiel la kerna apogilo de la UEA-estraro en la mastrumado de ĉiuj aferoj. Tio kreas okazon, por ke la ĜD fariĝu fakte la granda mastrumanto de UEA. Do, jen la demando: ĉu la ĜD, sendepende de la persono kiu okupas la postenon, estas fakte supera al la estraro, en la praktiko? Alivorte, ĉu pro la manko de tempo de la estraranoj la ĜD fariĝas la firma kaj sola administranto de UEA? Veronika Póor estas juna, ĝuas la fidon de la estraro kaj versajne kontentige plenumas siajn taskojn. Kian evoluon ni povas atendi de UEA, en la nuna strukturo, en ŝiaj manoj?

Kompreneble la ĜD kiel plentempa dungito devas havi kernan rolon en la mastrumado de la organizo, aliokaze ne havus sencion havi Ĝeneralan Direktoron. Tamen la decidpovo de la direktoro devas esti en la kadro de la decidoj de la organoj kiuj havas politikan manda-



ton, nome la Estraro kaj la Komitato. La ĜD devas gvidi la stabon al la plenumo de iliaj decidoj.

Pri kontentiga plenumo de la taskoj mi forte dubas, sed certe estas aliaj homoj kiuj povos priskribi tion pli bone el alia vidpunkto – la evoluo de financoj kaj membraro estas tamen sufiĉaj atentigoj pri malkontenteco. El la UEA-buĝeto de antaŭviditaj 90 000 eŭroj kiom da mono estis akirita?

Ĉu UEA, ĉu TEJO povos plu roli centre en la agado por kaj per Esperanto en la mondo? Ĉu ne venis la horo por reipensiti la nunan strukturon de la Esperanto-movado?

UEA havas la devon roli centre en la E-agado rilate al kelkaj fakoj, kiel ekzemple eksteraj rilatoj kie necesas strukturo de formala organizaĵo. Kompreneble la mondo evoluis kaj en aliaj kampoj la rolo de internacia organizo iĝas nun malpli necesa.

Tradiciaj roloj kvazaŭ ni estus ankoraŭ en la komenco de la pasinta jarcento, sen interreto kaj sen tutmondiĝo, ne plu havas sencion en la nuntempa mondo. Ŝajnas al mi, ke la rolo preninda de UEA, TEJO kaj ĉiuj aliaj E-asocioj de la mondo devus havi tute aliajn trajtojn. Okaze de TEJO, mi konstatas ian avangardecon, ĉar ĝi estas iomete sociale engaĝiĝinta. Eble pli da kuraĝo por profundaj kaj radikalaj reformoj en la pens- kaj agmanieroj de la E-institucioj estus la vojo por ke la E-movado ne plu ŝrumpu, ĉar Esperanto mem fartas bone. Kiujn grandajn kaj eksterkestajn reformojn indas

konkretigi, sen konsidero de la granda hezitemo de konservativuloj?

Eksterkestajn ideojn novulo povus doni pli facile ol mi, junulo kiu tamen aktivas de pli ol jardeko en la movado.

Pri indaj malgrandaj kaj grandaj reformoj oni povus longe paroli, sed mi pensas ke pli necesas pensmanieraj ŝanĝoj el kiuj nature venus poste reformoj. Klare en la nuna reta epoko ne plu nepras asocio por konekti esperantistojn, malkiel en la epoko kiam naskiĝis UEA. Tial mi kredas ke por E-organizo indas investi en “servoj” al esperantistoj nur tiam, kiam ili efektive donas profiton utiligeban por subteni la poresperantan agadon.

UEA investas profesiajn rimedojn en servoj al la komunumo (ekz. revuo, jarlibro, kongresoj, libroservo) sed lasas plejparte al volontulaj fortoj eksterajn rilatojn kaj informadon. Mi kredas ke la fokuso de la E-organizo devas esti ĝuste labori por ekstera informado por logi novajn esperantistojn kaj eksterrilate por pliestimigi kaj subtenindigi Esperanton. Tiujn agadojn oni devus plenumi per bona strategio kaj altkvalita kaj trejnita skipo.

Mi preferus ke nia komunikado alekstera, de la lobiado ĉe politikistoj ĝis la mastrumado de niaj Facebook-paĝoj, estu prizorgata de fakuloj kaj ricevu la taŭgan prioritaton. Kompreneble tio devas ne limiĝi al la centro sed etendiĝi je landa nivelo kun la partopreno de landaj organizoj al komuna strategio kaj aliflanke profesia subteno de la centro al la “periferio”. Ni ja ne povas atendi, ke en plej multaj landaj asocioj estu fakuloj aŭ almenaŭ la monaj rimedoj por dungi ilin.



Fakto estas, ke venos tempo kiam servoj kiel revuoj, libro servoj kaj jarlibroj havos la konkurencon de la servoj de multe da aliaj organizaĵoj kaj eĉ de privataj entreprenoj (ekzemple, kiam la libromarkato fariĝos pli granda). La Principaro de Frostavallen, kiu pledis por instruado, informado kaj aplikado (en 1956! – https://eo.wikipedia.org/wiki/Principaro_de_Frostavallen), ŝajne estis neglektita de la E-asociaro, kiu zorgis preskaŭ nur pri instruado, laŭ modelo bazita sur nur amatora kaj volontula laboro. Kio pri intensigo de la laboro sur la kampo de aplikado kaj modernigo de la informado kaj profesiigo de la E-instruado, surbaze de la direktivoj de Frostavallen?

Evidente Ivo Lapenna estis inteligenta homo kun strategia perspektivo; estas vere mirinde ke dokumento pli ol 60-jara estas ankoraŭ plurflanke aktuala, malgraŭ evidentaj epokaj mankoj. Aliflanke estas harhiritige ke pluraj aferoj menciitaj en la “ĉefaj eraroj” restas “ĉefaj eraroj” en 2017 kaj ili estas eĉ pli amplifitaj danke al la sociaj retoj.

Mi opinias, ke TEJO bone avangardas en tiuj tri kampoj. Ni dungis komunikiston kiu zorgas pri niaj sociretaj kanaloj kaj faris el la Facebook-paĝo de TEJO unu el la plej interesaj kaj viglaj Esperantaj paĝoj.

Krome ni ricevas eŭropajn subvenciojn kiuj ja ebligas havi la rimedojn por profesieca laboro. Nun plenumatas projekto pri efika komunikado en kiu ni trejnigis interalie pri la maniero alparoli malsamajn publikojn, kaj baldaŭ

ekos alia projekto pri trejnado de E-instruistoj.

Ĉefe aplikado bezonas nian plej grandan atenton, ĉu ne?

Mi ja ne konsentas ke la aplikado de Esperanto bezonas nian plej grandan atenton. Mi kredas ke per spontana agado de unuopuloj aŭ sendependaj kolektivoj povas naskiĝi altkvalitaj agadoj per Esperanto. Aliflanke, la agado por Esperanto, ĉefe tiu celanta eksteran publikon, ne oftas kaj bezonas multe pli da atento kaj investo fare de niaj organizaĵoj.

Aliteme, Trevor-Roper, unu el la gravaj britaj historiistoj, diris, jam en 1965 (sed temas pri ankoraŭ aktuala diraĵo), ke “eble estonte oni povos instrui ion pri la historio de Afriko. Sed ĝis nun estas neniu aŭ preskaŭ neniu afrika historio, nur historio de la eŭropanoj en Afriko. Ĉio cetera estas mallumo, same kiel pri la historio antaŭ-Kolumba en Ameriko. Mallumo kiu ne estas subjekto por la historio.” En tiu kunteksto, kio pri la agado de eŭropaj E-organizaĵoj kaj grupoj en Afriko, kiel UEA, TEJO kaj la Esperanta Civito? Afriko ŝajne transformiĝis en scenejon por ili, agantaj kiel protagonistoj, dum UETAn (Unuiĝo de Esperanto en Tuta Afriko) oni ignoras kaj eĉ bojkotas. Ĉu afrika esperantisto devas nepre konsenti kun la politiko de la eŭropaj esperantistoj por ricevi la necesan agnoskon? Kion diri pri ĉio ĉi?

En la lerneja programo, almenaŭ en Italio, oni dediĉas multe da atento al la praegipta civilizacio, kvazaŭ kiel komenco de historio, kaj al la militoj inter Romio kaj Kartago.

Certe malpli da homoj scias pri la legenda Timbuktuo en la Malia imperio aŭ pri la plurjarmila historio de Etiopio, tamen estus erare kaj eŭropcentrisme diri ke en Afriko estas nur historio de eŭropanoj.

En tutmondiĝa socio, certe indus lerni pli por konsciigi, ke la historio disvolviĝis paralele en la cetero de la mondo. En Eŭropo tio signifus lerni pli pri la historio de Afriko kaj ankaŭ pri Orienta Azio kaj Ameriko.

Same estus erare kaj malrespekte difini Afrikon kiel “scenejon por eŭropaj organizoj”. Ja multo okazas, organizata de afrikanoj mem je loka nivelo, kaj tio estas agnoskenda; la fakto ke multaj ne konas la agadon de ANEB aŭ la Aksuman imperion ne signifas ke ili ne ekzistis aŭ ne gravis.

Krome, UEA, TEJO kaj la Esperanta Civito estas organizoj ne eŭropaj sed tutmondaj (kvankam praktike Eŭrop-Afrika en la okazo de la Civito). TEJO el sep estraranoj havas vicprezidanton kiu loĝas en Usono; la kasisto kaj la ĝenerala sekretario estas vjetnamanoj; alia estrarano estas kolombiano. Aldone preskaŭ duono de la landaj sekcioj kaj verŝajne plejparto de la membraro ne estas en Eŭropo; la IJK mem okazis en Eŭropo nur du fojojn dum la lastaj sep jaroj. Kaj fakte simila estas la situacio en UEA.

La agado de UEA kaj TEJO disvolviĝu laŭeble ĉie. Bedaŭrinde, ekonomia malegaleco, vizaj problemoj kaj malpli facila retaliro donas al niaj afrikaj samideanoj malpli da oportunoj agadi je tutmonda nivelo. Agado en Afriko kun moviĝo de aktivuloj postulas pli da rimedoj ol en aliaj mondopartoj ĉar malofte la lokuloj povas notinde kontribui finance.

Pri “konsento kun la politiko de eŭropaj esperantistoj”, organizi unufoje Internacian Junularan Kongreson en Afriko ebligis danke al la subvencio al projekto pri Afrik-Eŭropa Junulara Kapabligo en la kadro de Erasmus+, kiu donis la rimedojn (kune kun malavara donacado de esperantistoj) por vojaĝigi pli ol seddek gejunulojn el Afriko kaj Eŭropo al la IJK. Kadre de tiu projekto, por kiu Eŭropa Unio pretis doni subvencion, la efektiviĝotaj agadoj estis difinitaj plejparte en Eŭropo.

Tio tamen estas tute escepta okazo ĉar neniel alie eblintus vojaĝigi pli ol kvardek junajn afrikajn esperantistojn el dek landoj por renkonti aliajn dekojn da junaj esperantistoj. Ĝenerale mi dirus, ke “devi nepre konsenti kun la politiko de eŭropaj esperantistoj” estas tute fremda esprimo kaj koncepto en TEJO.

Aliflanke ni ne povas ignori ke estas ĝenerale financa dependo de la E-movado en Afriko ĉar ĝi povas tre malfacile financi sin.

Aspekto ŝanĝinda estas, ke nun plejparto de aktivuloj en Afriko povas membriĝi en UEA nur danke al Fondajo Canuto por kio necesas esti proponite de alia movada instanco kun la fina aprobo de la Ĝenerala Direktoro. Kiel UEA-komitatano por TEJO mi proponadas reformon de la kotizsistemo de UEA kun kotizoj proporciaj al la pokapa Malneta Enlanda Produkto (MEP) de diversaj landoj, tiel ke pagante malaltan kotizon (eĉ € 1 en landoj kiel Burundo aŭ Kongo) afrikaj esperantistoj povu aliĝi al UEA kaj TEJO pagante memsian solidaran kotizon kaj lasante Fondajon Canuto al homoj kiuj efektive estas aparte malriĉaj ankaŭ relative al sia landa situacio.

“

... tia ideologio pri Esperanto kiel malplimulta lingvo de diaspora popolo ne estas komuna al la plejparto de TEJO-anoj

Jes, viaj argumentoj estas akcepteblaj, sed estas granda problemo rilate la afrikajn organizaĵojn Unuiĝo de Esperanto en Tuta Afriko (UETA). Gbeglo Koffi parolas pri koloniisma sinteno de UEA, kaj eble li troigas, sed kial interesas nek TEJO nek UEA la evoluo de UETA? Kial flegi konfliktojn kun ĝi? Mi insistas, ke vi koniguvian vidpunkton pri la tezo, ke UETA estas grava iniciato de la afrikaj esperantistoj kaj bezonas agnoskon kaj apogon. Nuntempe, la impreson, kiun mi havas, estas, ke ĝi estis izolita de la grandaj internaciaj organizaĵoj.

UEA havas landajn sekciojn en Afriko kaj TEJO havas landajn sekciojn en Afriko. Tiuj organizoj estas niaj naturaj dialogantoj kaj agantoj en Afriko, kaj estas afrika komisiono kun specifaj taskoj. Komprenoble estas apartaj situacioj; kiam Unuiĝo Togolanda por Esperanto (UTE) volis subpremi la junularon ni kunlaboris kun la togolandaj junaj esperantistoj ekster la oficiala kadro de Junulara Organizo de Togolandaj Esperantistoj (JOTE). Aliflanke almenaŭ TEJO strebas atingi ĉiujn junajn esperantistojn en la kontinento kaj ĉiujn engaĝi kaj aktivigi.

Se oni vidas la neceson agadi je alia nivelo, oni eĉ povus pripensi strukturajn ŝanĝojn enkondukante kontinentan nivelon elektitan desube anstataŭ desupre kiel nun okazas pri la komisionoj. Tamen, en la nuna situacio, tio ne okazas kaj komprenblas ke UETA ne estas natura partnero por ni.

Kial ĝi ne estas natura partnero por TEJO?

UETA ne havas (facile troveblan?) retejon, ne estas en sociaj retoj kaj mi apenaŭ aŭdis pri ĝi dum la IJK en Afriko.

Povas esti ke ĝi faras multon kaj mi tion ne scias, sed la ĉefa agado pri kiu mi havas informojn estas Afrika Kongreso intence organizata por “ŝteli” la nomon al iniciato de UEA. Bedaŭrinde mia impresoj pri UETA estas ke temas esence pri platformo por umbrela laboro gvidatan de homoj kiuj emas agadi antagonisme al UEA anstataŭ kontribui al komuna laboro en TEJO kaj UEA, kie afrikaj esperantistoj bonvenas samkiel esperantistoj el ĉiuj aliaj mondopartoj.

Persone mi sufiĉe multe komunikis kun Gbeglo Koffi antaŭ jaro perspektive al la IJK kaj mi eliris la konkludon ke li estas tiuspeca homo kun kiu ne eblas konsenti. Fakte mi agnoskas ke provi diskuti kun li estas ĝenerale tempoperdo.

Mi opinias, ke UETA bezonas apogon kaj agnoskon, sed Heroldo klopodos amplekse pritrakti tiun temon aparte kaj senpartie per sendependa aliro (jam ĉi-numere). Nu, ni parolu pri alia polemika temo, la Esperanta Civito, kies ĉefcelo, nome “esti agnoskita kiel internacia subjekto de internacia juro”, estas mia opinio tre interesa, sed kies mastrumado, tro burokrataj internaj reguloj kaj multa manipulado de la reganta grupo kompromitas la tutan koncepton. Kion vi opinias pri la Esperanta Civito? Ĉu la bonaj rilatoj de TEJO kun ĝi signas estonte pli fundan partneriĝon? Ekzemple ĉu eblos, ke TEJO fariĝos Civita establo?

La ideo pri esperantistoj kiel popolo estas sendube tre interesa kaj ĝi efektive respegulas kelkajn trajtojn de la nuna realo de Esperantujo; verŝajne ankaŭ povus utili por iaj celoj tia “subjekto de internacia juro”. Sed tio ne estas mia vizio pri Esperanto; mi subtenas Esperanton kiel internacian transpopolan lingvon por solvi la komunikajn problemojn je internacia nivelo.

Mi tamen bedaŭras, ke la debato pri la Civito ne estas je tia ideala nivelo sed je la nivelo de personaj konfliktoj, foje eĉ kun insultoj. Aliflanke la “pompeco” de la Civita stilo povas facile inspiri kelkajn mokojn kaj krome laŭ travideblo kaj demokratiemo, kiel montris la eldiro de la demisiinta Konsulo, la Civito havas tre evidentajn problemojn.

TEJO devus kunlabori kun ĉiuj kiuj pretas kunlabori, do ankaŭ kun la Esperanta Civito; la junularo ne bezonas nigrajn listojn. Pro tio ke la Civito havas relative viglan kulturan kaj artan agadon, mi opinias ke tio povas esti ja komuna kampo de kunlaboro.

Aliflanke miapercepte tia ideologio pri Esperanto kiel malplimulta lingvo de diaspora popolo ne estas komuna al la plejparto de TEJO-anoj. Lasta poziciigo de TEJO pri la temo estas la komitata rezolucio en 2012 kiu parolis pri “Raŭmisma finvenkismo”. Cetere la agado kadre de eksteraj rilatoj kaj la politikaj pozicioj de TEJO disvolviĝas klare en alian direkton. Do mi pensas ke por TEJO ne havus senco iĝi Civita establo.

Ĉu vi planas resti ligita al la TEJO-agado aŭ planas konkretigi aliajn projektojn? Fakto estas, ke la junulara movado ĉiam bakas aktivulojn, kiuj poste fariĝas gravaj aktivuloj por la “ĝenerala movado”. Nu, kio pri via agado ekde nun?

Evidente mi restas ligita al TEJO, mi ja estas komitatano Ĉ de TEJO, komitatano A de UEA por TEJO kaj mi membras en la Elekta Komisiono de TEJO (kaj en tiu de UEA). Krome, nome de TEJO mi estas prezidanto de la Konsulta Organo pri Membrecaj Aferoj de la Forumo Junulara Eŭropa.

Kiel junulo mi agadis en la “ĝenerala movado”, ekzemple dum tri jaroj kiel estrarano de Itala Esperanto-Federacio; de ok mi estas en ĝia nacia konsilantaro kaj mi ĵus estis reelektita por aldonaj tri.

Do, vi vidas, mi ne malaperas. Tamen, post ĉi tiuj lacigaj jaroj, mi bezonas iomete ripozi kaj iom malpli intense aktivi.

* Enkonduko bazita sur biografieto en TEJO-retejo.

Kelkaj notoj pri Luigi Pirandello 150 jarojn post lia naskiĝo

Carlo Minnaja

Pri la grandaj verkistoj oni memoru ĉe datrevenoj:⁽¹⁾ la 28an de junio 1867 naskiĝas en Caos, eta loko apud Girgenti (nun Agrigento), Sicilio, Luigi Pirandello, unu el la plej influhavaj verkistoj de la pasinta jarcento, gajninto de la Nobel-premio pri literaturo en 1934 (mortinta en Romo la 10an de decembro 1936). Da eseoj kaj plenaj libroj pri li aperis amaso en multegaj lingvoj, tial mi ĉi tie memorigu nur kelkajn apartaĵojn. Li estis filo de sufiĉe riĉa burĝa familio (la patro produktis kaj prikomercis sulfuron), en kiu oni spiris atmosferon de tendenco al liberiĝo de la burbona familio, liberiĝo fine plenumiĝinta kun la kreo en 1861 de la itala ŝtato, al kiu ankaŭ Sicilio estis aliĝinta post referendumo.⁽²⁾ Katolika edukado, poste forlasita, privata instruigo, translokiĝo en 1880 al la sicilia ĉefurbo Palermo, kie komenciĝas lia rilato kun kuzino, kiun la gepatroj komence kontraŭas, sed poste akceptas, kondiĉe, ke la junulo forlasu la studadon kaj interesiĝu pri la familia industrio. Li fakte tion faras, vizitante ofte la sulfur-minejojn kaj laborante en ili, kaj tio estos fono de kelkaj liaj postaj romanoj kaj noveloj. Li enskribiĝas al ambaŭ fakultatoj de beletro kaj juro (tiam eblis) en Palermo, kaj alproksimiĝas al movado socialist-tendenca kiu kunigis urbajn proletojn, ministrojn kaj kamplaboristojn. Li definitive elektas la beletrajn studojn kaj por ilin kompletigi iras al Romo, kie li loĝas ĉe onklo. La urbejo lin seniluziigas, la ŝtaton li trovas elefantece burokrata; sola fasciniĝo estas la renkontoj kun la teatra vivo kaj kun artaj trupoj.

Lia studenta kariero ne estas ĉiam facila, kaj tion li rakontas en dokumentoj ĝis nun malmulte studitaj kaj preskaŭ ne disvastigitaj, kiuj troviĝas kolektitaj en la Biblioteko-Muzeo pri li en Agrigento. En Fragmento de aŭtobiografio, kiun li diktis al la amiko Pio Spezi en 1893, li skribas:

“Mi havis konflikton kun la instruisto pri latina lingvo kaj literaturo, profesoro Occioni, dum ekbonvolis al mi profesoro Monaci, docento pri Latinida Filologio. Ĉi-lasto, kiu estis kompreninta mian tenacan karakteron, eĉ se tio povas ŝajni bizara, konsilis min fini la universitaton en Germanio kaj tranĉi tiel ĉiun malagraban okazon pri konflikto kun la menciita profesoro, kiu ankaŭ estis la estro de la Beletra Fakultato. Mi decidis do iri en la kleran Germanion kaj mi elektis la universitaton de Bonn”. Kaj poste li aldonas: “mi studas la germanan, ĉar estas pleja honto ne ĝin koni”.

En siaj leteroj al la fratino Lina, kiun li ĉiam konsideris sia plej intima akceptanto de liaj konfidecoj, li skribas pri la granda laboro en kiu li engaĝiĝis: studado de la du latinaj verkistoj Plaŭto

kaj Terencio por povi ilin kompari kun la itala komedia arto de la deksesaj jarcentoj. La studoj ĉe la universitato estas aliaj kaj ankaŭ liaj unuaj verkoj ne traktas la teatron, kiu, male, poste iĝos lia granda eksterordinara produktado. Du malgrandajn poemarojn li kunmetas en 1889; en la dua, Pasko de Gea⁽³⁾ eldonita en 1891, aperas la amhistorio kun Jenny Schulz-Lander, filino de lia hotelmastro, al kiu la poemaro estas dediĉita. Sed li balanciĝas inter poezio kaj filologio, sentante, ke se li plu volus flegi ambaŭ interesojn li iĝos malbona poeto kaj tre mezkvallita filologo. Lia Notkajero de Bonn estas verkata dum la jaroj 1889-1893 kun etendiĝo ankaŭ al posta jaro; en ĝi kolektiĝas pluro plej diversspeca: aludoj al Sicilio, fragmentoj el Dante kaj Petrarca, citaĵoj el latinaj verkistoj kaj notoj pri la universitataj lekcionoj en la itala, franca kaj germana; aldoniĝas poeziaĵoj, noveloj, intrigoj de teatraĵoj; en ĝi ankaŭ la kolekto Elegie boreali (Nordaj elegioj) (1899), en kiun, li skribas al la fratino Annetta, li enfermas ĉiujn siajn dolorojn: “ĝi estos, mi ne min trompas, libro nur por malmultaj altpiritaj animoj, kiuj kapablas kompreni la arkanan doloron de la vivo.”⁽⁴⁾

La 21an de marto 1891 Pirandello doktoriĝas per la disertacio *Läute und Läutentwicklung der Mundart von Girgenti* (Sono kaj evoluo de la sonoj de la parolmaniero de Girgenti), en kiu li pritraktas la dialekton de sia urbo kaj de la ĉirkaŭa provinco, kiun li dividas en diversajn lingvajn areojn. Al li profesoro Foerster, lia patrono ĉe la doktoriĝo, estis promesinta sekvan dungigon kiel komisiita profesoro pri itala literaturo ĉe la sama universitato kun sufiĉe alta salajro; male jam en la unuaj tagoj de aprilo Pirandello revenas al Romo, kie li establiĝos definitive.

La longe balanciĝinta fianĉiĝo kun la kuzino estas definitive rompita kaj nia aŭtoro, pro instigo de la patro, edziĝas kun Antonietta Portulano, bela nigrahara junulino, filino de riĉa kunsocietano de la patro; kvankam la geedziĝo estis antaŭplanita per interfamilia akordo kaj Antonietta estis sen granda klereco kaj neniam partoprenis en la kulturajn agadojn de la edzo, tamen ŝi provizas feliĉan kaj aman familian vivon, kun la naskiĝo de tri gefiloj, Stefano en 1895, Lietta en 1897 kaj Fausto en 1899.


La familian vivon tamen taŭzis katastrofo en 1903: terfalo kaj sekva inundo subakvigis la sulfurminejon de la patro, kiu estis en ĝi investinta sian tutan kapitalon kaj ankaŭ parton de la doto de Antonietta. Je la lego de la letero tion anoncanta ŝi estis trafita de paralizo ĉe la kruroj, kaj ankaŭ ŝia mensa ekvilibro konfuziĝis por ĉiam: ŝi vidis fantomojn, ŝi fariĝis patose ĵaluza kun delira paranojo, eĉ direktita kontraŭ la filino, kiu provos suicidon (sed

feliĉe la prajmo de la pistolo ne funkciis) kaj fine foriros el la hejmo. La filo Stefano estis vokita al la armeo, li estis enprizonigita kiel militkaptito de la aŭstroj kaj revenis hejmen nur post la militfino, kun postrestaĵoj de vundo, kio eĉ pli akriĝis la malsanon kaj mensan misedvilibron de Antonietta. En 1919 ŝi estis, laŭ komuna konsento de Pirandello kaj de la filoj, lokita en hospitalon por mensmalsanuloj, kie ŝi restis ĝis la fino de sia 88-jara vivo en 1959. Dum la tuta enhejma periodo de la malsano de la edzino. Pirandello ŝin ameme flegis; liaj verkoj montras introspekton al la psikanalizo de Freud kaj al la rilato de la socio koncerne mensmalsanulojn. En liaj verkoj kiel la romanoj *La estinta Mattia Pascal* (1904), *Unu, neni, centmil* (1926, sed antaŭe felietone publikigita en gazeto) aŭ la teatraĵo *Tiel ja (se al vi ŝajnas)* (1927) insiste aperas la problemo de la identeco, kia ĝi prezentiĝas al la aliaj kaj, entute, al si mem.

La vivo fariĝas ankaŭ finance kriza, ĉar el tiu minejo la tuta familio ĉerpis rimedojn kiuj permesis tre bastatan vivon. Tial Pirandello bezonas intense labori por vivteni la familion kaj li intensigas siajn kunlaborojn kun gazetoj kaj la literaturan produktadon, kiu tamen, komence, apenaŭ provizis tantiemojn: poemkolektoj, eseoj, noveloj sporade publikigataj en gazetoj; fariĝas fiksa lia ne multe pagata instruado pri itala literaturo ĉe la universitatnivela Supera Instituto Porvirina en Romo, kiun li tenas de 1897 ĝis 1922; impona rezulto de lia verkado estas la *Noveloj* por unu jaro, kies unua ordigita versio de 15 rakontoj aperas en 1922. Lia celo estis verki fakte unu rakonton por ĉiu tago, kiujn li planis kunigi en 24 libroj de po 15 rakontoj; ĝis sia vivofino en 1936 li sukcesos kunmeti 256, la lasta aperis la tagon antaŭ lia morto. Pliaj 26 aperos posteume, en alieditora redakto.⁽⁵⁾ En sia multengaĝa verkado li partoprenas ankaŭ polemikon kontraŭ Gabriele D'Annunzio, cetere lia preskaŭ samaĝulo (1963-1938), pri la jarcentfina krizo de la etikaj valoroj.⁽⁶⁾

Kvankam Pirandello estas internacie konata ĉefe pro siaj teatraĵoj kaj romanoj, la noveloj estas grandioza pentraĵo pri la socio, ĉefe sicilia en la unuaj, en roma medio en la postaj. La ĉefaj temoj estas la interna konflikto de la persono, la ŝarĝo de la tropostulema familio, la laboro peza, monotona kaj malmulte pagata, ĝis tiuj verkitaj post la longa teatra sezono en la lastaj vivojaroj, kie rolas superrealismo kaj metafiziko: la dialogo estas forte reduktita al preskaŭa monologo.

Tre diskutata estas lia aliĝo al faŝismo, de li jen evidentiĝita, jen rifuzita laŭ la momentoj de la vivo. Post la falo de la faŝista reĝimo oni dum multaj jaroj tion kaŝis aŭ minimumigis, ĉar oni ne volis makuli la memoron de la personeco de



Ĉi tiu ilustraĵo estis farita ekskluzive por HdE de la j. desegnita per specialaj inko kaj kraĵono sur Canson-paĉeteblo: € 200,00 (inkluzivas la sendokostojn). K.

(1) La tuta verkaro de Pirandello estas libere legebla ĉe <http://www.pirandelloweb.com>.

(2) Pri la transiro de la antaŭaj burbonaj posedaĵoj al la naskiĝanta itala ŝtato traktas fama romano de Giuseppe Tomasi di Lampedusa, *Il gattopardo* (La panterkato), el kiu la reĝisoro Luciano Visconti ekstraktis filmon kun Burt Lancaster,

ter, Alain Delon kaj Claudia Cardinale. Fragmento el tiu verko, en traduko de Maria Rosaria Spanò, aperis en C. Minnaja: *Luigi Pirandello kaj aliaj siciliaj aŭtoroj*, FEI, 2012.

(3) Gea en la greka mitologio estas la origina diino, patrino tero.

(4) La foto estas ĉerpita el la Biblioteko-Muzeo de Pirandello en Agrigento (Sicilio), reproduktita en *Pen*, organo de la itala PEN-klubo, jaro IX, n-ro 33, okt.-dec. 2015.

(5) En 1994 (senŝanĝe repesita en 2001) aperis la kompleta kolekto en la itala; volumo de 1470 dense presitaj paĝoj, ĉe la eldonejo Newton, en la

serio “La Mamutoj”. Ĝi enhavas ankaŭ ampleksan bibliografion pri eseoj kaj komentoj fare de diversaj fakuloj.

(6) Pri la ĵus menciito aperis: C. Minnaja (red.): *Gabriele D'Annunzio – Antologio*, EVA, 2013.

(7) Libro pri D'Annunzio estis jam menciita; pecoj


el Salvatore Di Giacomo troviĝas en G. Azzi: *Itala antologio* (CoEdES, 1987); pecoj el Marinetti estas en C. Minnaja: *Enlumas min senlimo* (If-koop, 1990); de Ungaretti ĵus aperis *Vivo de homo – ĉiuj poemaroj* (tr. N. Rossi, FEI, 2017).

(8) Pri la Nobel-laŭreato Montale aperis C. Minnaja: *Eugenio Montale kaj aliaj liguraj*

regulo

ARTO KAJ KULTURO

Pirandello estis el altburĝa familio, kiu vidis en la socialismaj principoj nekoheran celon al socio teorie justa sed fakte senorda, kie principo de samrajteco estas simple nereala...



Unu brazila artisto Diego Freitas. La originalo, apero, havas la formaton 30 cm x 42 cm. Ĝi estas kontakto: Diego Freitas, satierhd@gmail.com.

Pirandello per la klara diskonigo de lia pozicio rilate al la reĝimo. Tio estas historia hipokriteco: Pirandello estis el altburĝa familio, kiu vidis en la socialismaj principoj nekoheran celon al socio teorie justa sed fakte senorda, kie principo de samrajteco estas simple nereala, kaj ja fakte ĝi neniam konkretiĝis; liaj priskriboj pri la mizera stato de la subaj tavoloj estis tamen el la dealta supereco de sia kulturo, kaj – kial ne diri tion? – de sia financa situacio. Li estis kreema persono kaj li diris: “mi estas faŝisto, ĉar faŝismo kreas”; kaj la restarigo de piramida socio, en kiu malmultaj kleraj saĝuloj komandas kaj la plimulto obeas, tute ne malplaĉis al li. Jam la 17an de septembro 1924, antaŭ ol Mussolini definitive establis sian diktatorecan unupartian reĝimon, Pirandello sendis al li la jenan telegramon: “Ekscelenco, mi sentas, ke ĉi tiu estas por mi la momento plej oportuna por deklari fidon sentatan kaj servatan ĉiam silente. Se via Ekscelenca Moŝto min estimas inda eniri la Nacian Faŝistan Partion, mi favore konsideros kiel plejaltan honoron esti en la loko de la plej humila kaj obema sekvano”. Male, dum unu el siaj alternahumoraj momentoj, li kolere ŝiris la partian membrokarton antaŭ la vizaĝo de alta partia funkciulo.

Pirandello estis ankaŭ inter la 250 subskribintoj de la Manifesto de la faŝistaj intelektuloj al la intelektuloj de ĉiuj nacioj, lanĉita la 21.04.1925 de la tiama ministro pri instruado, la filozofo Giovanni Gentile; fakte ne malmultaj intelektuloj tiutempaj aliĝis al la faŝisma ideologio, tiam ja eliteca sed ne (ankoraŭ) tiraneca, kun forta inspiro ĉe la patriotaj idealoj de la Itala Relevo. Inter la subskribintoj estis Gabriele D’Annunzio, Salvatore Di Giacomo, Filippo Tommaso Marinetti, Giuseppe Ungaretti.⁽⁷⁾

Tiu lia pozicio estis severe kritikata de la liberalaj intelektuloj, kiuj tuj poste (01.05.1925) respondis per Manifesto de kontraŭfaŝistaj intelektuloj, redaktita de la filozofo Benedetto Croce kaj subskribita de multe pli vasta aro da intelektuloj, inter kiuj Eugenio Montale, Marino Moretti, Luigi Einaudi.⁽⁸⁾ Senpasia rigardo al ambaŭ tiuj tekstoj, kvankam verkitaj de absolutaj elstaruloj de la itala kulturo kaj eĉ konsidere al la nestabila postmilita tempo, klasus ilin intelekte tre povraj kaj polemike senkonsistaj, krom lingve malfacile kompreneblaj pro tro torditaj frazoj. Eble la daŭra apudeco de Pirandello al la faŝista partio klariĝas ankaŭ per lia bezono ricevi por siaj teatraj trupoj subvenciojn de la ŝtato, kiu tamen ĉiam preferis kaj pli multe honoris kompare al li kaj D’Annunzio kaj Grazia Deledda, Nobel-laŭreatino pri literaturo en 1926. Cetere, laŭ rekonstruo pri la faŝisma periodo startinta en Italio en 1960 kun la historiisto

Renzo De Felice (1929-1996), tamen konstatata de aliaj historiistoj, la populareco de tiu reĝimo estis ne malvasta precipe en la popola tavolo, atingante sian pinton per la “Afrika Milito” (1935-1936), kiam Italio konkeris Etiopion kaj sin lokis en la rolon de eŭropa potenco; do esti faŝisto en tiu periodo ne estis strange eĉ por intelektulo.

La granda sukceso de Pirandello komenciĝas per la teatra verkado, kiun li praktikas plene en la dua kaj tria jardekoj de la pasinta jarcento kaj kiu lin konsekras kiel veran protagoniston de la eŭropa, se ne tutmonda, kulturo. La definitiva gloro venas kun la Nobel-premio en 1934, kiu estas al li atribuita pro la sekva motivaĵo: “pro lia aŭdaca kaj inĝenia renovigo de la drama kaj teatra artoj”. Tiurilate ĝuinda estas la jena anekdoteto.⁽⁹⁾ La tagon de la premio Pirandello vagas tra la koridoroj de la “Konserthuset”, koncertejo kie okazas la ceremonio, kaj serĉas la tiucelan ĉambron; li petas helpon de iu sinjoro elegante vestita kiu ekaperas el flanko ĉambro, kaj la sinjoro diras: “Ankaŭ mi iras tien; venu kun mi.” Ĉe la enira pordo de la salonego Pirandello cedas la enirrajton al la sinjoro, kiu respondas: “Mi ne rajtas, pro la protokolo; mi devas eniri lasta; mi estas la reĝo de Svedlando.”

Tre humura raporto pri tiu festo aperis en Literatura Mondo, plume de Tiberiu Morariu, rumano freŝe migrinta al Svedlando kiel Cseh-instruisto kaj akreditita kiel ĵurnalisto; el ĝi valoras ĉerpi kelkajn fragmentojn kaj informojn. Tutunue la jeno donas la ideon pri kiel estis taksata enlande la premio mem. Iu stokholma gazeto jene raportis pri la evento:

«Pirandello ricevis eniron en la regionon, kie polvo-kovritaj laŭrokronoj seke bruetas kaj la memorparoladoj kuŝas jam de jaroj prete skribitaj. La itala verkisto estas do la laste alveninta balzamota kandidato en la mumio-fako de onklo Nobel... Ĉe kongreso en Vieno oni proponis malpermesi eldonadon de libroj dum certa tempo (ĉu ne sekvinda ekzemplo por Esperantujo?), intertempe la Nobel-premio povus ripozi kaj kreski, kreski...».

Mi ne hontas konfesi, ke mi konas Pirandello-n pli laŭ liaj libroj ol de lia teatro. Precipe liajn novelojn. En kiuj la problemoj de l’ vivo renkontiĝas kun tiuj de l’ morto, peza atmosfero regas preskaŭ ĉie, ja la plej kutima scenejo de liaj noveloj estas la tombejo. Mi ŝatas la vivon...

Dank’ al la afableco de la sveda eksterafera ministerio, mi ricevis eniran karton al la «plej grava festo de l’ jaro». La Nobel-festo okazis en la Koncerta domo, en la sama salonego, kie okazis la solena malfermo de nia mond-kongreso.⁽¹⁰⁾

Sur la podio sidas antaŭaj Nobel-laŭreatoj, inter kiuj, jam arĝenthara, Selma Lagerlöf.⁽¹²⁾ Poste estis la premiado de aliaj fakoj (teda pro la troaj svedaj

paroladoj), muzikaj punktoj. En la longa kaj leginda raporto de Morariu estas multaj komentoj liaj kaj de ĉirkaŭantoj pri la arto de Pirandello; la leganto de la premiada parolado, prof. Hallström, klopodas fini sian prezenton per italaj frazoj. La transdonon de la diplomo far la reĝo Gustavo la Kvina tondre aplaudas la dumil ĉeestantoj. La raporto finiĝas per demando kiu estas aktuala ankoraŭ nun. Kaj mi demandas: kiam ricevos esperantisto Nobel-premion?

Preter la longa raporto de Morariu, la esperantista medio reagis ne simpatie al tiu premiado. En Literatura Mondo, dec. 1934, Kalocsay rimarkigas, ke krom la entuziasmoj ekzistas ne malmultaj kiuj ne aprezas la “ekstravagancojn” de la itala verkisto. En posta numero (julio 1935) en la rubriko Observo, subskribita de “V”, unu el la multaj kaŝnomoj de Kalocsay, aperas artikolo “Momentoj kun Pirandello”. En ĝi Kalocsay kontestas ties originalecon per la argumento, ke se estus pli multe konataj Ibsen, Schnitzler kaj Wedekind oni tuj rekonos, ke li estis forte influata de ili.⁽¹³⁾ Krome estas mistigita komparo inter la junulinoj kun kiuj Pirandello kaj D’Annunzio sin kunigis.⁽¹⁴⁾ La miksitaj juĝoj de Kalocsay tre verŝajne devenas de la aliĝo al faŝismo flanke de Pirandello; cetere la tiutempa esperantlingva kritiko estis ankoraŭ sufiĉe postrestinta kompare al la eŭropaj fluoj kaj ne kapablis enpenetri la revolucionan spiriton de la sicilia verkisto.

La revuo de la Itala Esperanto-Federacio nek menciis la gajnon (finfine Nobel-premio al italo ne okazas ĉiutage, entute pri literaturo ili estas ĝis nun ses, kaj Pirandello estis la tria post Giosue Carducci kaj Grazia Deledda) nek anoncis la morton en 1936. Sola mencio pri la aŭtoro estis en 1930, kiam en traduka konkurso anoncita de la Federacio estis postulata la esperantigo de unu akto el teatraĵo de Goldoni por la klasika teatro aŭ de unu akto de teatraĵo de Pirandello por la moderna.⁽¹⁵⁾

De Pirandello aperis esperantlingve la novelo La jaro (tr. C. Minnaja), en Heroldo de Esperanto, 83, 1(2099), 1-21 jan. 2007, kaj, en la menciita Luigi Pirandello kaj aliaj siciliaj aŭtoroj, du plenaj teatraĵoj: Tiel ja (se al vi ŝajnas) (tr. C. Minnaja) kaj Ses roluloj serĉantaj verkiston (tr. M. Lipari). En la sama volumo estas fragmentoj el la du romanoj La estinta Mattia Pascal kaj Unu, neniu kaj centmil (ambaŭ tr. C. Minnaja) kaj tri noveloj: La koketoj de la barelisto (tr. A. Faiella), La trajno fajfis kaj Vespere, unu geranio (ambaŭ tr. C. Minnaja).

Nia aŭtoro nun estas ankaŭ en la ĉielo: al unu el la asteroidoj orbitantaj inter Marso kaj Jupitero, malkovrita en 1994, estis donita la nomo 12369 Pirandello.

aŭtoroj, EVA, 2013; poemoj de Moretti aperis en la menciita Enlumas min senlimo; Luigi Einaudi estis prezidento de la Itala Respubliko en la jaroj 1948-1955.

(9) El la menciita numero de PEN.

(10) 1935, 1, p. 11-13.

(11) La UK en Stokholmo estis okazinta en la samjara aŭgusto, kaj el la rezultoj de ĝiaj kunsidoj startis la fondo de IEL kiel alternativa al UEA. La du organizaĵoj rekuniĝis en 1947.

(12) Selma Lagerlöf (1858-1940) estis la unua virino atinginta Nobel-premion pri literaturo (1909); en Esperanto ekzistas de ŝi Gösta Berling,

La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson, La infanoj de Betlehem, La mono de Sinjoro Arne, La junulino el Stormyr, La ringo de la generalo plus aliaj rakontoj dise aperintaj en revuoj.

(13) Henrik Ibsen (1828-1906), norvega dramisto kiu evidentiĝis la nekapablon de la homo realigi siajn aspirilojn; Arthur Schnitzler (1862-1931),

aŭstra dramisto kaj kuracisto kiu evoluigis la artan instrumenton de interna monologo; Frank Wedekind (1864-1918), germana verkisto, forte atakinta la burĝan socion nur ŝajne moralan sed kunigantan tragikecon kun grotesko.

(14) Post la nesaniĝebla malsano de la edzino kaj jarojn post ŝia enhospitaligo, Pirandello en

1925 ekrilatis kun la milana aktorino Marta Abba (1900-1989), tridek tri jarojn pli juna ol li, al kiu li atribuis ĉefajn rolojn en siaj teatraĵoj; liaflanke estis dolorplena amo, ŝiaflanke verŝajne nur granda admiro al majstro.

(15) La spuradon pri tiu anonco mi ŝuldas al d-ro Antonio De Salvo.



AFRIKA LITERATURO

Legado de aŭtoroj kiel la kenjano Thiong'o favoras la malkoloniigon de nia eŭrocentra vizio.

Restas en nia edukado miksaĵo de antaŭjuĝemo kaj perforteco pri tio, kio estas "altkvalita kulturo" aŭ "supera kulturo". La rezisto al la afrikaj literaturoj reflektas tiun koloniigitan edukadon.

Gustavo Brito*

La jaroj de koloniado de la afrika kontinento estas la ĉefa kialo de la strangeco esprimita en la demando: "Afrika Literaturo: kial ne?". Fakte, malgraŭ tion, ke la literaturo produktata en Afriko havas trajtojn de kontinenta frateco, ĉefe pro la ligiteco rilata al ekspropriigo kaj ekspluatado kiuj unuigas la popolojn de la tero, ne eblas trakti la temon singulare. Temas pri afrikaj literaturoj. Alia postkolonia efiko, kaŭzita de la enorma kultura ŝablono al kiu ni estas submetataj, estas la konsento pri tio, ke ankoraŭ nuntempe oni konfuzu kontinenton kun lando; la afrikaj landoj estas multo plia ol mitaj savanoj loĝataj de ferocaj bestoj kaj malsategaj popoloj.

Se ni akceptos la literaturan produktadon kiel unu el la fundamentaj karakterizoj de la arta kaj intelekta matureco de popolo, la afrika kontinento devas liberiĝi de iu kolektiva imagaro kiu rigardas ĝin kiel eksportanton de sklavo kaj militbildo por esti renkontata denove kiel kultura produktanto.

Miaj studoj pritraktas ĉefe la "anglalingvajn landojn". Malgraŭ tio, ke la multaj provoj elimini la indiĝenajn idiomojn estis en la tagordo de la koloniaj aranĝoj, la lokaj lingvoj ja postvivis kaj konstituas surprizan tekstan aspekton de la literaturoj kun iaj multoblaj formoj de hibrideco. Sudafriko, Ganao, Kenjo kaj Zimbabvo konsistigas mian esplorkampon, ekde la defendo de mia disertacio pri literaturaj studoj, en 2003. Bedaŭrinde la plejparto de la romanoj ankoraŭ ne havas tradukon en la portugalan; tamen la kreskanta akademio esplorado sur la kampo de la tiel nomataj postkoloniaj studoj kaj la neceso inkluzivi la Historion kaj la Afrikan kaj Afrobrazilan Kulturon en lerneajn instruprogramojn, per la leĝo 10639/03, montras ke, eĉ se malrapide, la aferoj ŝanĝiĝas.

Aliaj simptomoj de la ŝanĝo estas la apero de la Internacia Afrika Asocio de Kritikaj, Literaturaj kaj Kulturaj Studoj (portugale: AFROLIC), kaj la Nacia Renkontiĝo de Profesoroj de Afrikaj Literaturoj, kiu la lastan fojon okazis pasintdecembre, en la Federacia Universitato de Pernambuko (portugale: UFPE). Iom post iom nomoj kiel Mia Couto, Pepetela, Craveirinha, Agualusa kaj Paulina Chiziane komencas eniri la vortaron de la brazilaj legantoj. Evidente la fakto ke tiuj aŭtoroj verkas prioritare en la portugala faciligas la aliron – kaj estas eldonmerkato vetanta je ilia eniro en niajn librovendejojn kaj bibliotekojn, kun enkalkulitaj riskoj. Gravas emfazi ke, inter la steloj videblaj kaj nevideblaj, la sola problemo estas la distanco. Niaokaze, krom la lingva malproksimeco, temas ĉefe pri la mensa distanco. Postrestas en nia edukado miksaĵo de antaŭjuĝemo kaj perforteco rilate al kio estas "bonkvalita kulturo" aŭ "supera kulturo".

Unu el la plej konataj aŭtoroj, en la anglalingva mondo, estas la kenjano Ngũgĩ Wa Thiong'o. Lia romano *Weep Not Child* ricevis omaĝon okaze de sia kvindekjara datreveno, kadre de la 40^a Konferenco de la Asocio de Afrika Literaturo (portugale: ALA) en la universitato de Witwatersrand, Johannesburgo, 2014. Thiong'o posedas kelkajn gravajn librojn kiuj estis

tradukitaj al la portugala, kiel *Petals of Blood* kaj *A Grain of Weat*, kaj aliajn fundamentajn ankoraŭ ne tradukitajn, kiel *Decolonising the Mind*, publikigitan en Kenjo en 1986. La lasta nin interesas kiel teoria apogo por kompreni la bazojn de la rezisto kontraŭ la enhavoj rilataj al Afriko.

Malkoloniigi indikas la procezon per kiu kolonio reakiras aŭ akiras sian sendependecon per la foriro de la kolonia povo. Tamen la heredo de la kolonia ordo restis alkröita al la socia korpo. Ngũgĩ Wa Thiong'o, en sia libro *The Language of African Literature*, unua ĉapitro de la libro *Decolonising the Mind*, diras ke "la nokto de la spadoj kaj de la kugloj estis sekvita de gipso kaj nigra tabulo. Elstariĝas ke la kolonia lernejo, kune kun la misiistaro, ludis centran rolon en la procezo de kontrolo kaj ordo de la socioj sub la eŭropa regado; tamen la modeloj de la koloniaj lernejoj variis laŭ la metropolo kaj la lando. Tio, kion ili havis komune ja estis la kono kiel identiga marko de la elito kaj ĝia restriktita karaktero, same en la formo kaj en la enhavo.

Flora Veit-Wild, fakulino pri zimbabva literaturo, asertas en sia *Teachers, Preachers Non-Believers*, ke, por ascendi en sia eduka kvalifiko, la lernantoj devus eliri el la procezo "washed white"; alivorte, la procezo por altrudi la lingvon, la kulturon kaj la religion estis atinginta sian celon kiam la geknaboj forlasis la bazan lernadon adoptinte la "regulojn, la ŝatojn kaj la kredojn de la kristana instruisto". La lernejo prenas sur sin, ĉi-kuntekste, la respondecon kolonii la nomojn kaj la mensajn pejzaĝojn, per alkonformigo de la reprezentado de la loka realo al eŭrocentra bildo – intervenante en la percepton de la personoj pri si mem kaj la mondo.

Laŭ Thiong'o la "ekonomia kaj politika kontrolo neniam kompletas sen la mensa kontrolo". Do, la diskuto pri la malkoloniigado de la lernejo plue urĝas, same en Zimbabvo, Kenjo aŭ Brazilo. Kiel diras Thiong'o:

"La lingvo de la lerneja edukado de afrika infano estis fremda. La lingvo de la libroj kiujn ĝi legis fremdis. La lingvo de ĝia konceptado fremdis. Ĝia penso akiris la videblan formon de fremda lingvo. Simile la lingvo skribata de infano edukata en la lernejo (eĉ la lingvo parolata en la vilaĝa lernejo) apartiĝis de la lingvo hejme parolata. Estis eĉ ne minimuma rilato inter la skribmondo de la infano, kiu estas ankaŭ la lingvo de ĝia lerneja instruprogramejo, kaj la mondo de ĝia rilato kun la familio kaj medio.

Por kolonia infano la ekzista harmonio inter la tri aspektoj de la lingvo kiel komunikilo estis neriparebla rompita. Tiel kreiĝis la diseco inter la infana sentemo kaj ĝiaj natura kaj socia medioj, kion oni povas nomi kolonia memfremdiĝo. La memfremdiĝo plifortiĝis per la instruado de historio, geografio, muziko en kiuj la eŭropa burĝaro ĉiam estis la centro de la universo".

* Gustavo Brito estas brazila magistro pri literaturo kaj profesoro. Ĉi tiu artikolo aperis originale en la gazeto "Opção" ĉe <http://bit.ly/Thiong'o>. Esperantigis ĝin José Dias Pinto.

Lingvo Internacia

Jorge Camacho

1
elpensaĵo, produkto de kreo, rezulte kolektiva mensogo al si mem kaj al oni, ĵargon' surogata, placebo, hobia, zombia.

nova lingvo blinde malkapabla paroli pri, en, al, el mond' aŭ mondar protea, bunta, mulata, mestiza, hibrida.

malvasta kaĝo sen fermita pordo, tedaj pejzaĝo, filmo jam milfoje viditaj, liturgio infinita.

2
eble mi troigis, ja poetoj emas al troigoj kaj emfazoj malfajnaj, malsubtilaj.

tamen mi sentas ĉi ŝoke junan lingvon homogeniga oldkulturilo, unuanimiga, unuvoĉiga.

fojojn, falsfore fremdaj voĉoj (ho Probal, Zifu!)

agrabla rompas la kutimajn komforton, perspektivon – sed ĉi stimuloj ne atingas la cerbeton, kaj la saŭreĝo plu progresas surde forgesejen, abismen sur deklivo.

en ĉi regno de nerdoj' obseditaj pri lingva korekteco ("oni diru ne 'korekta' sed 'ĝusta'!" ili krias), ekzistas nur la kara afero, la ideo – ne la realoj monda kaj socia.

(ĉi regno liliputa sed abunda je mitoj litaniaj!)

kion diri per lingvo kiu trudas ne nur ĉapelliterojn sed ankaŭ sortimenton da finaĵoj kiuj onin devigas verbi, substantivi, adjektivi aŭ asi, isi, osi, i en kadro eŭrope senelira?

nerdo: (el la angla nerd) persono konsiderata negative stranga, ekzemple ĉar manka je socia talento, tede studema aŭ obsedita pri nekutima okupo aŭ hobia, kaj sume impresanta stulte, malloge aŭ ĝenule. gringo: alhomo al fremduloj loĝantaj en la hispanida Ameriko; ĉefe aplikata al usonanoj.

(kvazaŭ maleblus lingvi novajn vojojn alikategoriajn, rompajn, disajn...)

ne sufiĉas brilaj Miguel, István, Probal, Zifu ŝajn-ekzotike andaluza, hungara, barata, ĉina nek strange, tri-lingve gringa² Peter Browne meksik-amike landlima.

kie troviĝas inter ni la propraj Junot Díaz aŭ Gloria Anzaldúa denaske lingve, kulture, monde kaj gente, gene (eĉ ĝene!), genre³ hibridaj, mestizaj, miksaĵoj?

kaj niaj rifuĝantoj, migrantoj, forpelitoj, persekutatoj, ignoratoj, preterleĝuloj, marĝenanoj, ribelidoj – kie ili kaŝiĝas?

dum ni restaĉas en bobelo en inerto muta, ili tie, ekstere, dialogas, kunvoĉas kaj konspiras.

unue ni pretiĝu por aŭskulti kion ili diras en angloida ĵargono ĉiumonda kredeble malperfekta kaj disforma, tamen fakta, praktika, kaj, se ni havus iojn aldirindajn al iu ajn alia, ni elparolu tiojn tiulingve, kunkonstrue, kun la celo esti komprenitaj.

3
lingva fenomeno jam aborta, grundo fru-mature malfekunda, erco elĉerpita.

El la poemaro *Brulvunde*, 2017

Kanto de neeŭropa homo de la 21-a jarcento

Tatjana Auderskaja

Ho, Eŭropo!

En la 15-a jarcento vi bruligis viajn sorĉistinojn en la fajroj surplace. Mezepoko...

En la 20-a jarcento vi bruligis viajn civitanojn de ajna sekso kaj aĝo en la fornoj. Progreso!

En la 21-a jarcento vi bruligas pneŭojn en la fajroj surplace. Degenero.

Ho ve, Eŭropo, Eŭropo!

Kien vi ruliĝas tiel senbride, kiel brulantaj pneŭoj? Kio atendas vin fine de deklivo?

Neniu respondas.

Vivu, Vivu, Brazil'!

Paulo Silas

Plenumas jam revolucian agon la brazilano kiu transiras la landlimon kaj iras al hispanlingva nacio por koni fremdulojn, lerni novan lingvon aŭ kontakti malsaman kulturon, anstataŭ por aĉeti malmultekostan produkton.

Havas armilon en mano, kapablan renversi historiajn aranĝojn, la brazilano kiu anstataŭ sori al eŭropaj kaj usonaj mondkomprenoj, trakrozas la oceanon rekte ĝis Afriko.

Sed la granda insulo Brazilo, imperio de blankulaj privilegioj, drivas sur la tropika atlantiko, kaj sentas sin malproksima de ĉio civilizita.

La mensa koloniismo rigardas ataviste nostalgia al la kaduka kontinento, respektive konvinkita antaŭ la jankiaj krifoj sangmalpuraj kaj genufleksas subalterne al ilia mondordo. La lastaj spuroj de indianaj kaj negraj kulturoj krias sufokiĝantaj pro justecomanko kaj ne trovas malstreĉiĝon de la stringo en la brakoj de siaj gefiloj vartitaj per patrinĝentilo.

ARTIKOLOJ

HISTORIO

La forgesita lando Moresnet

Jolanta van Holstein

Dum pli ol 100 jaroj Nederlando, Belgio kaj Germanio havis komunan najbarlandon: Neŭtralan Moresnet. Tiu ĉi, jam preskaŭ forgesita minilando, apartenas nun al germanlingva Belgio, sed ekde 1816 ĝis 1919 ĝi havis propran standardon, propran estraron, propran ŝtatpolicon, propran poŝtmarkon kaj propran nacian himnon (cetere en Esperanto!). Ĝi havis surfacon de 3,5 km². La plej grava eŭropa zinkminejo troviĝis en Kelmis/La Calamine, kiu estis ankaŭ loko de la nomo de la zinkerco. La zinkminejo – konata kiel Altenberg (germane)/Vieille Montagne (france) – estis tiel granda natura resurso, ke oni batalis pri ĝi tra la jaroj: germanoj, brabantoj, la burgonja duko Filipo la Bona, Napoleono. Post la batalo de Waterloo en la jaro 1815 la mapo de Eŭropo devis esti reviziita kaj konforme ĝin la regnostrukturo de Eŭropo kaj ĝiaj kolonioj devis esti refarita.

Unu el la multaj limoj, kiuj devis esti markitaj sur la Viena Kongreso post la falo de la Napoleona imperio, estis tiu de Prusio kaj de la ĵus kreita reĝlando Nederlando. Tio okazis sufiĉe senpene tra la 500 kilometroj inter Grandduklando Luksemburgo kaj la vadmaro en Germana Golfo, sed pri la strio de 3 kilometroj ĉe la zinka minejo de Kelmis oni ne povis interkonsenti. Prusio kaj Nederlando batalis flankon ĉe flanko pri Waterloo, sed nun staris tutekstre fronte unu de la alia kaŭze de la fosujo.

Post unu jaro kaj 50 kunsidoj de speciale formita komisiono, oni atingis strangan kompromison. Ĉar la intertraktantoj ne povis interkonsenti, ili decidis ke la triangulforma regiono inter limlinioj “ne estas dividebla”. Ĝi fariĝis neŭtrala teritorio. La provizoraj linioj tranĉis la regionon transverse tra la malnova municipo Moresnet. La okcidenta parto ekapartenis al Nederlando kaj la orienta fariĝis Prusia Moresnet. La intera peceto malantaŭ la limlinioj eknomiĝis Neŭtrala Moresnet. Atendante la definitivon solvon, kiun oni esperis trovi ene de kelkaj jaroj, dume la regiono estis administrata kune de Prusio kaj Nederlando. Intertempe, neniu inter ambaŭ potencoj rajtis militite okupi la areon.

Tiu ĉi nova minilando havis en 1816 ne pli ol kvindek disĵetitajn, maldense lokitajn domojn kaj kabanojn, kaj entute 256 loĝantojn. Neŭtrala Moresnet kreskis ĝis la grava



Loĝantoj de Moresnet

mineja vilaĝo. La lignaj limpalisoj el 1816 estis en 1868 anstataŭigitaj de ŝtonaj specimenoj/ekzempleroj. Pli multo el ili staras tie ĝis nun.

En la 100 jaroj kiam Neŭtrala Moresnet ekzistis ĝi havis 5 urbestrojn, la unua urbestro restis 43 jarojn sur sia posteno kaj la lasta 20 jarojn.

Pli kaj pli da homoj alvenadis al Moresnet por labori en la minejo. En la jaro 1815 la urbo havis jam 2575 loĝantojn. La urbo kreskis kaj ekestis bezono de la komunuma konsilaro/magistrato, kies membroj estis ne elektitaj, sed kandidatigitaj de la urbestro. Elektaj neniam okazis, impostoj estis ekstrema malaltaj kaj neimiteblaj (kalkulitaj surbaze de kiom da tero, pordoj, fenestroj, mebloj kaj domservistoj oni havis), ne estis monero (oficiale validis nur franca franko, sed ankaŭ talero, regnomarko, arĝentgroŝo kaj belga franko estis bonvenaj), ne estis komuna lingvo, ne estis dogano, ne estis deviga edukado, ne estis deviga militservo, ne estis kortumoj. Sed la lando ja havis flagon (blua-blanka-nigra) kaj ornammoneron (per kiu oni ne povis pagi) kaj ŝtatpolicon kaj propran poŝtmarkon (la ideo estis de la loka filatelisto, sed post du semajnoj la poŝtmarko estis malpermesita).

La poŝtaĵojn liveradis du poŝtistoj: unu prusa kaj unu belga. Sed, se ili post sia rondiro volis kune trinki ŝnapŝon, ili bezonis tion

tre bone interkonsenti, ĉar inter Neŭtrala Moresnet kaj Prusa Moresnet estis tempodiferenco de unu horo.

Kelmis/La Calamine kreskis ĉirkaŭ la minejo. La direktoro de la minejo lasis konstrui la preĝejon por la laboristoj, kaj lernejon, kien rajtis iri senpage la infanoj de la laboristoj (kaj la knaboj kaj la knabinoj). Estis tamen ankaŭ alia mondo en tiu vilaĝo, la submondo. Oni drinkis tie multege, abunde, oni kontrabandis multege (por malaltaj impostoj la alkoholaĵoj el neŭtrala regiono estis eksterordinare malmultekostaj), svarmis tie drinkejoj kaj bordeloj. Alvenis multe da krimuloj al Neŭtrala Moresnet. Ĝi fariĝis kvazaŭ Eldorado altiranta figurojn de ĉie ajn. Kelmis havis malbonan famon. Ĉiuj kiuj havis pezan konsiencon kaj portis kulpon sur siaj ŝultroj fuĝis tien, kie oni ne povis kapti ilin.

Neŭtrala Moresnet estis samtempe pia minista komunumo kaj senbrida, diboĉa rabejo.

Ĉiun trian vendredon de la monato en la vilaĝa trinkejo “Select” kolektiĝis kvin homoj por iom nekutima aktiveco: ili sekvis lingvokurson de Esperanto. La instruisto klarigas la gramatikon kaj vortprovizon, kaj sekve ili konversacias en Esperanto. Neŭtrala Moresnet poste fariĝos la unua lando en la mondo kie Esperanto estos oficiala lingvo.

Unu el la esperantistoj estis la instruisto Gustave Roy, franco kiu amikiĝis kun la indus-

tria kuracisto Wilhelm Molly. Ili trovis unu la alian en la kampo de filatelo kaj filantropio.

Kaj Esperanto kaj Moresnet estis same neŭtralaj. Gustave Roy volis kunigi ambaŭ neŭtralecojn, li volis doni al Esperanto partojon. En la jaro 1907 Gustave Roy publikigis la pamfleton en la franca lingvo, alvokante kreskigadon de Neŭtrala Moresnet kun la celo, ke ĝi fariĝu la monda ĉefurbo de Esperanto.

Ludoviko Zamenhof sciigis al Roy ke li “kun granda intereso” legis la traktaton kaj opinias, ke la enkonduko de la plano estus grandega paŝo antaŭen “por la interna ideo de la esperantismo”. En Kelmis oni reagis entuziasme. Kvar foje semajne okazis Esperanto-kursoj, en kiuj partoprenis 140 infanoj kaj plenkreskuloj. Ĉe kelkaj restoracioj aperis la surskribo/epigrafo “Tie ĉi oni parolas Esperanton”.

Okazis propaganda festo kun 350 ĉeestantoj el enlando kaj eksterlando. Ekestis ideo por nomi la landon Amikejo.

La 4-an de aŭgusto 1914 la germana armeo transiris la landlimojn, profanante la limtraktaton de Akeno el la jaro 1816. Ankaŭ la belga neŭtraleco estas piedpremita. Komenciĝas la Unua Mondmilito. La urboj estas bruligitaj kaj detruitaj, civitanoj ekzekutitaj. Kiu povis, fuĝis al Nederlando. La triangulo de Neŭtrala Moresnet estis dum la milito tre atente gardata. La germanoj volis eviti, ke okazus kontrabandado kaj ke la belgoj per la neŭtrala zono transiru al Nederlando por aliĝi al trupoj de soldatoj. Post la invado la germana okupanto proklamis ke Moresnet falas nun nur sub la germanan jurisdikcion. Tuj post la armistico de la 1918 jaro, la komunumo de Neŭtrala Moresnet alvokis euforie per afiŝoj por aliĝi al Belgio, kiu protektis ilin kontraŭ la malsato en malfacilaj tempoj. Neŭtrala Moresnet malaperis el la landmapo kaj ĝia nova ĉefurbo fariĝis oficiale Bruselo. La artikolo 32 de la Traktato de Versajlo el 1919 ordonas la plenan suverenecon de Belgio pri Neŭtrala Moresnet.

Ni ne scias, kiel evoluis Esperanto kaj Esperanto-movado se la ideo de Amikejo ne fiaskus, sed finfine ĝi fariĝis parto de la Esperanto-historio. Oni povas nun malmulton retrovi el la preskaŭ jarcenta historio de Moresnet. Restis nur 50 limŝtonoj. Kaj kio por ĉiam restos de Amikejo estas la rememoro, almenaŭ se ni daŭre refreŝigos ĝin.

Esperanto kiel valoro por la BRIKS-landoj

Elisée By'elongo
Renato Corsetti

La mallongigo BRICS [prononcu: Briks, el anglalingva akronimo] staras por Brazilo, Rusio, Barato, Ĉinio kaj Sud-Afriko en la angla. Temas pri partnera rilato inter ekonomie disvolviĝantaj landoj kreita en 2006 kiel BRIC, kaj en kiu Sud-Afriko aliĝis nur en 2010 kaj tiel la nomo iĝis BRICS*.

Kvazaŭ komenciĝinta kiel politika partnera organizaĵo, BRICS tuj fokusis al socio-ekonomia kaj kultura kunlaborado. En la kultura kampo, la lingvo estas kerna, kiel vehiklo por disvolvo de kulturoj kaj valoroj.

Esperanto, lingvo iniciatita de la polo Ludoviko Lazaro Zamenhof en 1887, kaj proponita kiel pontlingvo al la homaro, nature povus iĝi unu el la brikoj de la kunlaboro inter la briksaj landoj. Notinda estas la realo, ke Esperanto firmiĝis dum jaroj en ĉiuj briksaj landoj eĉ antaŭ la agnosko de la Lingvo Inter-

nacia fare de Unesko.

Troviĝas en ĉiuj briksaj landoj naciaj asocioj, federacioj kaj lokaj kluboj de Esperanto kie “poliglotoj” kaj en kelkaj okazoj denaskuloj uzas la lingvon ĉiutage. Tie Esperanto estas uzata por socia kialo, akademia celo kaj ĉio cetera. La Zamenhofa lingvo kvazaŭ konkuras kun la Ŝakespeare kaj Moliere lingvoj mondscale, flanke de pli ol 6000 lingvoj ekzistantaj en la mondo. La konkurenco estas tikla kaj malegala inter la ĉina, la angla kaj Esperanto, ĉar la unua ĝuas la subvencion de la registaro de Ĉinio, la dua jam estas ligita al ekonomiaj oportunoj en labormedioj, sed Esperanto ja estas simple la justa ilo por egalrajta lingva ŝanco por ĉiuj.

La unikeco de Esperanto povas esti faktoro favora al ĝia pli sukcesa estonto. Kiel lingvo, Esperanto povus argumenti pri sia perceptita neŭtraleco, pacemo kaj facileco. Esperanto proponas pli ol la suprecititaj lingvoj al la homaro. Tamen, tiuj valoroj povas ankaŭ marŝi kontraŭ la fluo de la tempo, kon-

traŭ politika ambicio de kelkaj superpotencaj gvidantoj. En tiu situacio, Esperanto devas adaptiĝi al la ĉirkaŭstancoj kaj kreiĵoj kiel la BRIKS-komunumaro kun amasoj da projektoj, kiuj iras kun ĝi. Tio ankaŭ signifas ke esperantistoj devos kunagi, kunlabori inter si kaj kun alilingvanoj por flegi la “kulturon de BRIKS”, kiu nature havas lokon en la kulturo de Esperanto.

Ĉinio kun sia iniciato “Unu Vojo Unu Zono (UVUZO)” emas diskonigi la ideon, ke la homaro povas vivi frate kaj kune disvolviĝi per komerca kunagado. Estas frateco kiu naskas fratecan interkomunikadon, tiun valoron, kiun Esperanto enhavas en si. Ĉu eble ankaŭ pro tiu valoro Rusio miksiĝas en la aferoj de la landoj en sia proksima regiono? Ĉu pro tio Barato investas pli en Afriko nun ol antaŭe? Estas ankaŭ la sama valoro kiu sukcesigos Brazilon en la malfacila periodo dum politika malstabileco? Ĉu frateco sufiĉos kaj disponigos panon al homoj kies lando atingis la historian 27.7% de senlaboruloj kaj kies

nunaj gvidantoj ne konas la vorton “rezigni”, kiel Sud-Afriko?

Aliĝu, se vi briksano

Jes, ne nur estas pozitivaj perspektivoj, estas ankaŭ solvendaj problemoj kaj multaj defioj por firmigi Esperanton en la kunteksto de briksaj landoj kiel amikan pontlingvon, pretan por plenumi sian interbriksan, interregionan kaj interkontinentan mision.

Mil paŝoj komenciĝas per ekpaŝo, kaj la iniciato “Esperanto-en-BRIKS-landaro” estas nobla unua paŝo, apoginda de aliaj perespektantaj iniciatoj, institucioj kaj komunumoj. Konkretaj realigoj sur tiu kampo montras al la cetero de la mondo, ke Esperanto estas valoro por la briksaj landoj.

Se vi loĝas en unu el la briksaj landoj, simple aliĝu al la listo esperanto-en-brics-landoj@yahoo.com kaj deklaru vian pretecon labori por Esperanto en via lando kaj kontakti esperantistojn en aliaj briksaj landoj.

* HdE adoptas la Esperantan formon “Briks”, “Briksaj landoj” ktp



Scienca Heroldo

Scienco inter Seulo kaj Varsovio

Amri Wandel *

Fine de julio okazis la UK en Seulo. Ĝi havis ege intensan kaj senprecedence riĉan scian programon. Tiu estis la 70-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato, kadre de kiu okazis kvar kursoj de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), kaj entute 14 sciencaj prelegoj. Iliaj resumoj videblas en la IKU-retpaĝo de UEA, <http://uea.org/teko/IKU>.

Ekzameniĝis kaj ricevis AIS-diplomojn ĉirkaŭ 50 personoj. UEA eldonis la plej imponan IKU-libron iam aperintan: 190 paĝoj kun tekstoj kaj resumoj plurlingvaj de la prelegoj, kolore ilustritaj kaj fortike binditaj. Malgraŭ ĝia iom alta prezo (24 eŭroj), ĉirkaŭ 70 ekzempleroj estis venditaj dum la UK (malmultaj ankoraŭ estas mendeblaj ĉe UEA).

Post nur unu monato kaj duono okazis en Varsovio la 34-a Sanmarinea Universitata Studadsesio (SUS), kiu estas la plej altnivela kursa sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj.

AIS estis fondita de prof. Helmar Frank en 1985, kaj depost tiam okazis jam 39 SUS-oj (ne ĉiuj ricevis numeron).

Tio sugestas, ke averaĝe okazas almenaŭ unu SUS ĉiujare.

Bedaŭrinde tio ne tiel estis en la lastaj jaroj: la antaŭa SUS okazis antaŭ precize kvin jaroj, kio reflektas la plurjaran stagnon de AIS. Tamen, ekde la pasinta jaro okazis senbla plivigliĝo.

En la du lastaj kongresoj de UEA, en Nitra kaj Seulo, okazis AIS-senatkunsidoj kaj viglaj sesioj de la Internacia Kongresa Universitato, kun 3-4 AIS-kursoj kaj dekoj da AIS-diplomoj, publike disdonitaj. Dum la Zamenhof-jaro AIS okazigas SUS 34 en la urbo kie vivis kaj aktivis la kreinto de Esperanto.

Jarfine okazos en Saarbrücken, Germanio, la dujara kunveno de AIS-Germanio kaj la 11-a sesio de la Internacia Vintra Universitato, kun AIS-kursoj kaj ekzamenoj. Estis decidita ankaŭ la venonta, 35-a SUS, okazonta kune kun la Itala Kongreso en aŭgusto 2018 en Sanmarino, kaj jam okazas kontaktoj kun la Sanmarina Universitato, fondita de Umberto Eco.

La 34-a SUS estas rimarkinda fermo de cirklo, ĉar la lasta SUS, antaŭ kvin jaroj, okazis samloke kiel la nuna, kaj estis organizita de la sama teamo, mag. Komarnicka kaj prof. Foessmeier. Plie, okaze de la antaŭa SUS estis deklarita kunlabora intenco inter la Varsovia Alternejo pri Direktado (WSZ-SZ) kaj AIS. Ĉi-foje estis subskribita formala interkonsento inter la du organizaĵoj.

La ĉefaj eroj de la 34-a SUS estis interalie la Pola Tago, tri AIS-kursoj pri matematiko (kiun instruis la nova dekanino de AIS, prof. Christer Kiselman), logiko (prof. Foessmeier) kaj astronomio (prof. Wandel).

* Prezidanto de AIS, IKU-Sekretario

Freŝaj novaĵoj el la kosmo

Roberto Pigro

Ekzistas steloj estiĝantaj ĝuste nun en punkto de la kosmo, kie neniu iam antaŭe observis tiaĵon. La stel-formiĝo okazas ene de tre grandaj gas-fluksoj, kiuj estas eligataj je altega rapido el la centro de iuj galaksioj. La malkovro, lastatempe oficiale sciigita de la faka revuo Nature, eblis danke al observado plenumita – pere de la tiel nomata VeryLarge Telescope (VLT) apartenanta al ESO (Eŭropa Suda Observatorio) – de la italo Roberto Maiolino el la brita universitato de Cambridge. Kunlaboris kun ĉi tiu itala sciencisto ankaŭ astronomoj dungitaj ĉe la Itala Nacia Instituto pri Astrofiziko kaj aliaj esploristoj el la ŝtata universitato de Florenco, en la regiono Toskanio. Pli da informoj ĉi-rilate haveblas en la jena retpaĝaro: www.cassinisfditaly.wordpress.com

La plej pura nana stelo bruna iam observita? Temas pri la eteta Sdss J0104+1535, kiu kuŝas iuloke, je 750 lumjaroj de la tero, ĉe la haloo de la Lakta Vojo, en la direkto de la konstelacio de Fiŝoj. Tiu ĉi nana stelo bruna kreigis antaŭ ĉirkaŭ 10 miliardoj da jaroj kaj estas, oni asertas, eĉ la plej masiva ĝis nun konata (oni pensu, ke ĝia maso estas 90-oble plia ol tiu de Jupitero!). Priesplorate de kelkaj sciencistoj el la Instituto pri Astrofiziko de la kanaria insularo (Hispanio), Sdss J0104+1535 ŝajnas esti komponata de gaso, kiu estas 250-oble pli pura (ĝin estigas je 99,99% hidrogeno kaj heliumo) ol tiu, kiu konsistigas la sunon mem.

Misteran kaj mirigan fulmobrilon de ik-soradioj, devenantan de tre fora regiono de la universo situanta 10,7 miliardojn da lumjaroj

malproksime de nia planedo, freŝe malkovris internacia aro da esploristoj, inter kiuj kelkaj el la itala Nacia Instituto pri Astrofiziko. Tio eblis danke al la utiligo de la spaca teleskopoj Chandra de NASA (Tutlanda Aeronautika kaj Spaca Administrado). La senprecedenca fulmo, notita en la tiel nomata kampo CDF-S, havas verŝajne ligitecon kun iu katastrofa spaca okazaĵo, kiel ekzemple la kompleta detruigo de neŭtron-stelo aŭ de nana stelo blanka.

ESA kaj Roscosmos, respektive la eŭropa kaj la rusa kosmo-agentoj, limigis al du la nombron de la ejoj, inter kiuj oni elektos la plej taŭgan por la alteriĝo (aŭ, pli korekte, “almarsiĝo”) de la misio ExoMars 2020. La du lokoj de la planedo Marso konsiderataj “elekteblaj” prezentas ambaŭokaze la necesajn deziratajn karakterizojn de sekureco: iu gravega teknika kondiĉo estas tio, ke la ejo gastiganta la “almarsiĝon” situu je relative malalta altitudo, tiel ke iom da atmosfero ja estos por funkciigi la paraŝuton, kiu devos malrapidigi la malsupreniron de la alteriĝa modjulo.

Germana privata instituto, kiu okupiĝas pri astronomio kaj spacaj teknologioj, lanĉis lastatempe projekton por la realigo de la unua komerca spac-teleskopoj malfermita por la ĝenerala publiko. Ĝia nomo? Public Telescope. Precipa celo de la iniciato estas igi la astronomian observadon pli kaj pli alirebla por komunaj personoj kaj ne nur por profesiistoj. Tiam, kiam la koncerna spac-teleskopoj estos sendita en la orbiton, iu ajn – ĉu temas pri nuraj ŝatantoj fizikon, ĉu pri mezlernejaj instruistoj, ĉu pri fakuloj kaj sciencistoj – povos havi aliron al ĝi el ĉiu parto de la mondo pere de interreto.

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA INFORMAS

Denaskulo

La nocio native esperanto speaker laŭ Konsilio de Eŭropo kaj ALTE, tradukita per la vorto denaskulo, havas ekde 2006 oficialan difinon: aktiva esperantisto kies ĉefa hejmlingvo estis esperanto, kun funkcioj kaj eduka kaj identiga.

LTSEC

Lingvo Testa Sistema de la Esperanta Civito, bazita sur KEFR

Komuna Eŭropa Framo de Referenco por Lingvoj – Lernado, Instruado, Taksado, kun ses niveloj en Esperanto. Nur KCE diplomas pri ĉiuj niveloj de KEFR.

Direktivo Mühlemann



La direktivo Mühlemann, ratifita de la Esperanta Civito, difinas la taksokriteriojn. La direktivo entenas:

- gvidlinion pri KEFR kaj ALTE;
- la unuopajn partojn de ĉiu nivelo;
- kiel organizi la testokomisionojn;
- la difinon de “denaska parolanto”
- finanĉan klaŭzon.

Testo pri lokativo

En testo pri lokativo en etna lingvo, la kandidato devus scii pri la lando:

Olemme Raumassa. Menemme Tukholmaan.

(Ni estas en Raŭmo. Ni iras al Stokholmo)

Kiel povas esti en Esperanto?

Ni estas en Varsovio. Ni iras en Budapeŝton.

(la unua gramatiko aperis en Varsovio, Budapeŝto estis nia kulture plej grava urbo).

Kion diras nia sperto?



Globala lingvo bezonas globalan teston. La kono de Esperanto postulas

- malpli da tempo por lerni la gramatikon;
- malpli da tempo por akiri vortprovizon;
- pli da tempo por studi interkulturajn demandojn;
- iom da tempo por la propra kulturo.

Participoj

La pordo estas fermata

La pordo estas fermita

Tre facila en la simplaj tensoj, tamen Esperanto uzas la participojn kiel en la slavaj lingvoj. Testo por B2 devas inkludi tion.

Kono pri la propra kulturo

Kono pri la propra kulturo devas esti testata je ĉiu nivelo laŭ la normaro de LTSEC.

Testoprovo por A2 (fundamenta diplomo) povas esti la kompilado de aliĝilo por transnacia kongreso: tial vi devas scii ankaŭ pri kia kongreso temas, ĉar la testantoj povus demandi pri ĝi.

Ju pli la nivelo de la testo estas alta, des pli profunda devas esti la kono de la kulturo propra al Esperanto.

En flago videblas destino

Verdo estas la koloro de espero, blanko la koloro de paco, la stelo reprezentas la homaron (kvin por la homo, kvin por la kontinentoj): lingvo por la tuta homaro kreis sian angulon. Testisto devas konsideri tion.



Aperigo de ĉi tiu rubriko estas postulo de klaŭzo en la kontrakto de la vendo (fare de LF-koop) de Heroldo de Esperanto al Fabricio Valle.

Lingvio

La mondo de la lingvoj



Literatura Babelo: la malfacila tasko de la librotradukistoj

Estis tempo kiam la tuta homaro konsistis el nura grupo da posteuloj de Noa. Ili kuniris kaj parolis unu solan lingvon. Iam ili decidis konstrui turon tiel altan ke ĝi atingu la ĉielon. Tiam Dio aranĝis ke ĉiu parolu idiomon diferencon de la aliulaj, kaŭzante enorman konfuzon kaj ruinigante la entreprenon. La Babela Turo reprezentas la kristanan miton por la ekzisto de la diversaj lingvoj parolataj en la mondo. Nun-

tempe la nombro da idiomoj superas 7000. Kontraŭflue al tia babela konfuzo estas la tradukistoj. La itala verkisto kaj semiologo Umberto Eco estis teoriisto pri tradukado. En la libro “Preskaŭ la samo”, de 2003, la intelektulo diras ke traduki ne estas “diri la samon alilingve”, sed ja, fidelece al la originala teksto, diri “preskaŭ la samon”.

(Ĉi tiu artikolo aperis originala en Nexo Jornal)



Floru 200 floroj

Esence ĉio devas ŝanĝiĝi por ke la kerno 'disvastigo de Esperanto' ne ŝanĝiĝu.

La landoj de la mondo estas proksimume 200. Oni kompreneble disputas pri la suvereneco de kelkaj teritorioj kaj do ne ekzistas preciza nombro interkonsentita. Estas por mi absolute klare, ke Esperanto estos en bona pozicio, kiam en ĉiuj landoj de la mondo estos bona nombro de parolantoj de Esperanto. Ni ĉiuj konas la historion de la disvastigo de Esperanto kaj do ne miras se en Kazakio, unu el la plej vastaj landoj de la mondo, la parolantoj de Esperanto estas malmultaj, disigitaj kaj neorganizitaj. Temas esence en ĉi tiu okazo pri restaĵoj de rusoj, kiuj pluloĝas tie post la fino de Sovetio.

Se vi trairas la liston de la landoj de la mondo, vi trovas multajn ŝtatojn kun neniu aŭ tre malmultaj parolantoj de nia lingvo. Ĉi tiu situacio estas neakceptebla kaj por ĝisostaj finvenkintoj kaj por partoprenantoj en Pasporta Servo.

Por la unuaj, la finvenkintoj, estas klare, ke neniu internacia organizaĵo konsideros Esperanton monda lingvo, se ĝi ne estas disvastiĝinta en multaj partoj de la mondo. Kiam oni prezentis Esperanton por diskuto al la Societo de Nacioj aŭ al Unesko en Montevideo, oni bezonis la voĉdonojn de ĉiuj landoj. Krome ĝi ne vere povas funkcii kiel monda lingvo. Nuntempe la angla estas multe pli monda ol Esperanto. Se oni devas iri al Urugvajo aŭ al la insularo Fiĝio, oni povas antaŭpensi, ke per la angla eblos fari kelkajn aferojn, dum parolantoj de Esperanto tie ne ekzistas.

Cetere la aĝo-strukturo de esperantistoj en Eŭropo, kie la movado estas pli malnova, estas tia, ke ege pli da homoj mortas ol venas al la lokaj organizaĵoj aŭ rekte al UEA. Ĉiuj ĉirkaŭrigardas por membroj, sed la ekonomie evoluantaj landoj simple ne plu havas potencialajn

membrojn. Estas vero, ke la sukceso de la kurso de Esperanto en Duolingo igas nin esperi, ke tiuj membroj venos. Eble jes, sed iu, kiu lernas Esperanton rete, estas lojala nur al siaj komputilo kaj ret-provizanto.

Por la partoprenanto en Pasporta Servo la situacio estas same nekontentiga, ĉar simple li ne povos trovi gastigantojn en Urugvajo aŭ en la insularo Fiĝio.

Kion oni devas fari en ĉi tiu situacio? Simple oni devas apliki la statuton de UEA, kiu klare diras ke la unua celo de UEA estas: (a) disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto. Poste sekvas aliaj celoj el kiuj kelkaj rilatas al la komunumo de la esperantistoj, sed la unua celo staras tie skulptita kiel sur roko.

De multaj jaroj tiu celo estas forgesita. Oni okupiĝis pri ĉio, de Universalaj Kongresoj al libro-eldonado, sed ne pri disvastigo de Esperanto.

Kiam mi iĝis prezidanto de UEA en 2001 kaj atentigis pri tio, komence oni pensis, ke mi estas freneza kaj due kelkaj misgvidatoj (oni scias ke Alah'o gvidas nur tiujn, kiujn li volas gvidi, kiel klare diras la Korano) komencis misfamigan kampanjon kontraŭ mi por pruvi, ke la kaŭzo de la membrofalo estas mi kaj ne la agado de UEA, kiu turniĝis ĉirkaŭ gardado de la malnovaj membroj, kiuj pagis por ke la oficistoj ricevu siajn salajrojn. Tio funkciis ĝis nun, sed nun ni vere estas en situacio, en kiu la salajroj ne estas certaj.

Kiel malnova UEA-ulo mi estas konsternita, sed mi havas ankoraŭ nur la malnovajn konsilojn.

● Oni revenu al la ĉefa tasko de UEA, disvastigi Esperanton ĉie, en la 200 landoj, kiuj floru kaj portu novan sangon al movado maljuniĝinta;

● Oni transportu la servojn al landoj malpli kostaj ol Nederlando, ekzemple Brazilo aŭ Uzbekistano;

● Oni lasu nur la direktoron kaj la monon en Eŭropo;

● Oni gvidu la tuton per la nunaj elektronaj rimedoj;

● Oni lu-donu la sidejigon en Roterdamo kaj oni uzu la ricevitan lu-pagon por funkciigi UEA-n kaj disvastigi Esperanton al Butano kaj al la aliaj 150 landoj sen esperantistoj;

● La servoj pagu sin mem. Tion nun faras sufiĉe bone la Universalaj Kongresoj, sed apenaŭ la aliaj servoj.

Esence ĉio devas ŝanĝiĝi por ke la kerno "disvastigo de Esperanto" ne ŝanĝiĝu.

En 2020 Heroldo de Esperanto 100-jariĝos

Ni planas organizi grandiozan jubilean festadon, ĉar ne ĉiutage gazeto 100-jariĝas kaj kaze de HdE, ĝi sendube meritas festegon pro ĝia granda kontribuo al la E-movado ekde 1920.

Por ke ĝi vivu aliajn 100 jarojn...kaj ekde nun ankaŭ kun nacilingvaj eldonoj por neesperantistoj, nepre anticipu vian kontribuon por la jubileo. Elektu tuj vian donacaĵon inter la ĉi subaj opcioj.



● Abono por la papera versio + reta versio

● Abono por nur la reta versio

● Solidara abono por nepagpovuloj

Abonu tuj ĉe - www.heroldodeesperanto.com

PAGMANIEROJ

Vi povos pagi vian abonon per

● PayPay ● UEA-konto ● Banka - Ĝiro (nur brazilanoj)

INFORMPETOJ:

Google-grupo por demandoj pri ĉiuj aspektoj de Heroldo

● <http://bit.ly/HeroldoRespondas> ● informpeto@heroldodeesperanto.com

HDE-JUBILEO: 100-JARIĜO

Aliĝu al la festoj de la Jubileo de Heroldo de Esperanto

Informiĝu pri la historio de Heroldo, legu malnovajn artikolojn de la tempo de la tri antaŭa fazoj kaj la opinion de la veteranaj kaj novabakitajn legantoj de Heroldo

<http://bit.ly/HdE-Jubileo>

AL NIAJ ABONANTOJ

Ni informas niajn abonantojn, ke:

● Heroldo konkrete survojas al regula aperitmo;

● Ekde la venonta numero ĝi havos 16 paĝojn;

● Ni difinos regulan aperitmon ankaŭ por la rubrikaj de niaj kolumnistoj;

● Diversajn informojn pri la laboro de la redakcio de HdE vi povos trovi ĉe <http://bit.ly/HDE-redakcio-retejo>